

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Slovakio survojas
al progreso**



**NRO-konferenco
atentas lingvajn
homrajtojn**



**Nervi pri Faŭsto:
"Eksterordinara
traduko"**

**4 paĝoj pli
ĉi-numere!**



Esperanto furoris en Hanojo

Vi trovos...

181 **Malferme**

Kulturi per lingvo la pacon

Osmo Buller

182 **EKSTERA EFIKO MEZURAS SUKCESON**

Puramo Chong



Du flankoj de kongresa medalo

YAMASAKI Seikō

184 **Solidareco**

Mil pakaĵoj kampanje iĝis dumil

Renato Corsetti

185 **Eksteraj rilatoj**

**Pri lingvaj homrajtoj en Seulo
Manifesto 2000: Ek al 100 000 000**

186 **Kongresa komuniko 1**

187 **Eŭropo**

Purgatorio finiĝis en Slovakio

Intervjuo kun Ján Vajs

188 **Someraĵ aranĝoj**

Kuneco ekumena

Bogusław Sobol, Simon Smits

Tria fojo en Ĉeĥio

Krešimir Barković

188 **Internacia Infana Kongreseto**

La zumado pluumos

Stefan MacGill

189 **Forumo**

Implicoj de nova epoko

Ian Fantom

190 **Kalendaro 1999-2000**

192 **Reagoj**

194 **Memore**

Forpasis "lingvisto pri lingvoj"

François Lo Jacomo

Arto

Lingvo arton provokas

Ernst Leuze

195 **Navige tra TTT-paĝoj**

196 **Recenzoj**

*Mauro Nervi pri **Faŭsto***

*István Ertl pri **Timor***

*Ivan' Naumov pri **Sur Parnaso***

*Ionel Oneț pri **Moskvaro***



H.C. Kolbe (Frankfurt, Goethe-Museum)

199 **Laste aperis**

Kaj plue...

200 **Loke - Persone Fake**

202 **Influe - Foliume Oficiala Informilo**

204 **Forpasoj**

La kovrilo: Vervaj kongresanoj en Hanojo (Edvige Tantin Ackermann)

Dekstra paĝo: Fiŝisto (Marianne Vermaas)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifoj (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT-paĝo: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zappelli.



KULTURI PER LINGVO LA PACON

Antaŭ deko da jaroj la lingvouzon de Unesko eniris nova termino, “kulturo de paco”. La ideo ne estis nova. Ĝi esence aperis jam en la Konstitucio de Unesko, kie ĝiaj fondintoj skribis tuj post la dua mondmilito: “Ĉar la militoj ekestas en la homaj mensoj, same en la homaj mensoj estu pretigitaj la defendoj de la paco.”

Nun la kulturo de paco estas akceptita kiel gvida principo de la tuta UN-sistemo. Por diskonigi ĝin tutmonde, UN proklamis la jaron 2000 Internacia Jaro por la Kulturo de Paco kaj la periodon 2000-2010 Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Ne-Perforto.

Ni esperantistoj familiaras kun la kulturo de paco, eĉ se per aliaj vortoj, ekde la Unua Libro. La Zamenhofa “interna ideo” aŭ, laŭ Lapenna, “solidariga rolo de Esperanto” kaj “humaneca internaciismo” estas ĝiaj parencoj. Unesko difinas la kulturon de paco kiel valorojn kaj sintenojn kiuj en la konduto de individuoj kaj kolektivoj kreas kaj plifortigas la spiriton de paco kaj la respekton al aliaj. Ĝuste kiel parolis Ivo Lapenna en la Haga UK en 1964:

“Ekde la momento, kiam tiu genia junulo el Bjalistok ekhavis la ideon doni al la homaro komunan lingvon, tra ĉiuj niaj realigoj ĝis la hodiaŭa tago, la ideo de komuna, supernacia neŭtrala lingvo, estis ligita al la penso pri interkompreniĝo ne nur buŝa, sed ankaŭ kora, al la ideo de toleremo kaj komprenema rilatado

al alies pensoj, ideoj, ideologioj kaj religiaj sentoj, al interkompreniĝo inter la rasoj kaj la nacioj, sekve al la monda paco.”

La Esperanta literaturo estas belestro de packulturo. Almenaŭ mi ne trafis en ĝi verkon kiu pravigas perforton aŭ malestime traktas iun popolon. Nia lingva kulturo ne akceptas negativajn esprimojn pri popoloj. Mi povas nomi nekompreneblaĵon en mia finna lingvo “hebreaĵo” aŭ “ĉinaĵo”, kaj germano povas vidi en ĝi “bohemiajn vilaĝojn”, sed por la sennacie neŭtrala Esperanto tia afero estas “volapukaĵo”. Tamen, individuoj malpacas ankaŭ Esperante. Konsciaj aŭ nekonsciaj antaŭjuĝoj ankaŭ inter esperantistoj ne mankas. Ni povas akcepti ke alia popolo estas alia, sed ne ĉiam ke alia homo estas alia. Ni devas ankoraŭ packulturi nin mem.

Estas nature ke UEA akceptis la alvokon de Unesko partopreni en la agado por packulturo, ĉar ĝi estas nia kutima agado kaj ĝia ideo unu el niaj statutaj celoj. Kun aliaj NRO-j ni ekkolektis subskribojn por la Manifesto 2000 (vidu p.185), per kiu laŭreatoj de la Nobel-pacpremio resumas la principojn de la kulturo de paco. La Tel-Avivan UK ni dediĉos al diskuto pri “Lingvo kaj kulturo de paco”.

Ni fosu ankaŭ la packulturan sulkon.

Osmo Buller



Se unu el la celoj de E-kongreso estas instigi la aktivecon

de loka movado, certe sukcesis la Dua Azia Kongreso (22-25 aŭg., Hanojo, Vjetnamio).

Efektive, post la kongreso jam aŭdiĝas el Vjetnamio kuraĝigaj novaĵoj: estis fonditaj pluraj Esperanto-kluboĵ kun multaj junuloj, studentoj kaj aliaj kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto pro la informoj de landaj amas-komunikiloj. Fakte, Esperanto estis dum la semajno de la Azia Kongreso furora temo de televidoĵ, radioĵ, ĵurnaloĵ kaj gazetoĵ en Vjetnamio. Kaj tia furoro montriĝas kiel klare perceptebla realo.

Profundaj bazoj

En Vjetnamio nia lingvo havas sufiĉe profundan bazon: dum la militperiodo Esperanto estis unu el la konkretaj batalarmiloĵ por paco en tiu lando. Dum tiu fatala periodo vjetnamaj esperantistoj eldonis mirinde multajn E-librojn kaj gazetojn kaj radioelsendis en nia lingvo por alvoki pacon. Sed post la milito la lando fariĝis preskaŭ izolita, ĉefe pro la ekonomiaj sekvoj de la terura milito. Do por ordinaraĵ e-istoj en Vjetnamio ankoraŭ estas malfacile vojaĝi eksterlanden kaj ĝui internaciajn E-kongresojn.

Jen en kia lando okazis la Dua Azia Kongreso, laŭ decido kiun KAEM faris antaŭ 3 jaroĵ en Ŝanhajo, en la Unua Azia Kongreso. [Vidu '96 nov., p. 181.]



KONGRESO DE ESPERANTO
Hanojo 22-25 Aŭg 1999



Ekstera efiko mezuras sukco

Du flankoj de kongresa medalo

Jen elektitaj eroĵ el subjektiva kongresraporto de YAMASAKI Seikō.

Resume, tiu ĉi kongreso estis granda sukceso en tio, kaj sole en tio, ke ĝi stimulas la progreson de la vjetnamia movado. Ĝi ne profitigis la partoprenantojn, kiuj venis forgesinte sian komforton; ne fortikigis la movadon en aliaj partoj de Azio nek la azian ĉeeston de UEA; ĝiaĵ malaltnivelaj diskutoĵ ne kontribuis al la esperantista kulturo.

Mi estis malkontenta kiam en la Unua Azia Kongreso KAEM decidis pri la kongreslando favore al Vjetnamio kontraŭ Barato. (Eĉ ne unu

hindo venis al Hanojo.) Tamen nun, postevente, mi gratulas pro la decido. La vjetnamoj pruvis sin eksteratende kompetentaj.

Eŭropanoj

Okulfrapis la multeco de eŭropanoj, aŭ blankuloĵ. Ĉi ties maldegno pri neeŭropaj eventoj estas ja vaste konata, kiel atestis skandale malmultaj ĉeestantoĵ en ne-eŭropaj UK-oĵ. La prezidanto de UEA mem venis al Hanojo, kaj ne pro sia posteno. Kep Enderby oratoris, interalie, pri sia

“modesta fiero” pro tio ke li sukcesis savi de ebla morto — kiel ministro en laborist-partia registaro ŝanĝanta politikon direkte al neinterveno — junulon kiu nun atendis malantaŭ li la salutvicon nome de Aŭstralio, kaj multajn aliajn kiujn tiam minacis konskripcio por la milito kontraŭ Vjetnamio.

Japanoj

Ekzakte sin pravigis en Hanojo flugilhavaj vortoj de la bedaŭrata SAKAMOTO Syōzi, iama direktoro de Kansaja Ligo de Esperantaj Grupoĵ: “La koridoroĵ de kongresejo estas plenaj de japanoj, multe pli malmultaj estas japanoj en salonoĵ de kunsidoĵ, apenaŭ iu japano stariĝas por paroli en kunsidoĵ”. La plimulto de la 160 japanaj partoprenantoĵ ĉefe turismis kaj

Disdonado de "Flagoj de amikeco" i.a. al (de dekstre) Kep Enderby por UEA, Puramo Chong por KAEM kaj al Yu Tao por Ĉina E-Ligo.



La unua prezidinto de KAEM, sukcesiginto de la Unua Azia Kongreso (Ŝanhajo, 1996) kaj unu el la motoroj de la Dua, TAKEUTI Yosikazu (ĉi-apude), ricevis pro "granda kontribuo al la azia E-movado" la plej altan ĉiujaran E-honorigon japanan, Premion Ossaka, en la 86-a Japana E-kongreso (15-17 okt., Motizuki). (SIBAYAMA Zyun'iti)



En la Palaco de la Registaro, de maldekstre: Kep Enderby, vic-ĉefministro NGUYEN Manh Can, LKK-estro Vu Xuân Hồng kaj LKK-membro HÔNG Ngoc Bôi.



Foto de Takeuti: Arkivo de UEA. Citeraj: Edgardo Tamarin Ackermann

Puramo Chong

Prezidanto de la Komisiono pri

Azia Esperanto-Movado (KAEM)

eson

butikumis, ĉiam krokodilante, sen intereso pri la seriozaj diskutoj en salonoj.

La ŝtato kaj la movado

Mirigis forta subteno de la registaro al la vjetnama movado. Salutis persone la vicprezidanto de la ŝtato, kaj ŝi daŭre sidis ĝis la fino de la soleno. Tio tamen havas nedezirindan reverson: oni devas tre atente nutri la favoron de la instancoj. Aliflanke, necesas ankaŭ zorgo por teni la movadon netuŝebla de la fluktuo de politikaj tendencoj. Sufiĉus citi ekzemplojn el eksksocialismaj landoj, kies ŝtate subvenciata, ŝajne fortika movada strukturo senspure malaperis.

Al mi tamen ŝajnas ke la vjetnama movado havas iugradan imunecon:

kun juna kolego el la estraro de la japana landa asocio, INUMARU Fumio, mi vizitis unu el la oficejoj de Vjetnama E-Asocio, unuafoje elirinte en la urbon post tuta semajno da kongresa labor-kateniteco. Herboradikaj movadanoj informis nin pri multo. Laŭ ili, troviĝas nenia subvencio de la registaro krom la senpaga uzo de la konstruaĵo por oficejo kaj kursoj. Elspezo ne estas multa, ĉar instruantoj instruas senpage. Ĉiuj laboroj estas volontulaj. Tial la membrokotizo povas esti malalta.

La plena raporto aperos en la revuo Esperanto en Azio, kiun povas ricevi ĉiu kiu donacis minimume ekvivalenton de 2000 japanaj enoj (proks. € 17,50) al Fondaĵo Azio de UEA.

Senprecedencaj subtenoj

LKK saĝe kaj energie laboregis dum tiuj jaroj kaj montris rimarkindan rikolton jam en la unua tago de la kongreso. Kiel alta protektanto, vicprezidento de la ŝtato faris en la solena inaŭguro paroladon sufiĉe favoran al niaj lingvo kaj movado; la urbestro de Hanojo gratulis per bonveniga saluto. Fakte, unu el la ĉefaj kialoj de la sukceso estas ke la kongreso akiris senprecedencan subtenon de la registaro. Dum la kongreso la ŝtatprezidanto ordenis plurajn per medalo de amikeco, kaj vicĉefministro oficiale akceptis la reprezentantojn de landaj asocioj. La urbestro de Hanojo preparis belan bankedon por landaj delegitoj. Celebre al la Dua Azia kongreso en sia urbo, la Hanoja urbestro preparis specialan eventon dum la kongreso: estis plantita en urba parko memoriga arbo nomata "Zamenhof". Tiaj novaĵoj ĉiuvespere elsendiĝis en programoj dum la ĉefa televida tempo. Gazetaran konferencon en la dua kongrestago partoprenis multaj ĵurnalistoj tre interesataj. Ili demandis i.a. pri la perspektivo kaj reala utileco de artefarita internacia lingvo kaj pri tio ĉu ĝi konkurence rilatas al la angla lingvo.

Post longa izolo

La Dua Azia kongreso en Hanojo sukcesis ne nur eksterflanke sed ankaŭ el la vidpunkto de kongresa enhavo. En ĝi partoprenis ĉ. 460 homoj el 16 landoj. Tio signifas ke alvenis esperantistoj el preskaŭ ĉiuj partoj de la azia kontinento, krom el la fora Eŭropo. La simpozioj pri la ĉefa kongresa temo, "Kunlaboro por paco, stabileco kaj disvolvigo", ĉiam viglis kun multe da ĉeestantoj; ankaŭ 11 fakaj kunsidoj kaj prelegoj atestis pri ĉiama energio de la kongresanoj. LKK invitis al nacia vespero la altnivelan ŝtatan artoteamon por prezenti tradician muzikon kaj dancon. Ili vere mirigis la kongresanojn per spektaklo el la unika vjetnama kulturo. La vjetnamaj esperantistoj, longe izolitaj disde internaciaj renkontiĝoj, montris grandajn favoron kaj afablon al la eksterlandaj gastoj.

Per ĉi tiu duafoja okazigo en Hanojo, Azia Kongreso fariĝis bela tradicio en la monda movado. Regiona kongreso konstateble utilas, ĉar per relative malgranda elspezo de mono kaj tempo oni povas ĝui plene internacian etoson, kian antaŭe nur UK ebligis. ★

Mil pakaĵoj kampanje iĝis dumil

Renato Corsetti

Dum la milito en eks-Jugoslavio UEA vastigis la agadon ĉirkaŭ la Konto Espero, kiu celas precipe esperantistajn viktimojn.

Tiel elkreskis Agado Espero, kiu celas kunligi kaj subteni iniciatojn de aliaj esperantistoj kaj E-organizaĵoj favore ankaŭ al neesperantistaj viktimoj. Unu el ĝiaj projektoj (vidu jul.-aŭg., p. 125) nomiĝas

"Mil familiaj pakaĵoj"

Nun, surbaze de detala raporto de la loka Humanitara Organizo Espero, starigita kaj estrata de e-istoj, oni vidas ke la respondo al la alvoko estis tiel bona ke fine oni povis donaci ĉ. 2000 pakaĵojn (precize: 1998). La disdono okazis interkonsente kun la Ministerio por rifuĝintoj kaj kun lokaj instancoj en Sarajevo, Novi Grad kaj Hadzici.

Inter la dankindaj donacintoj elstaras Fons Català (Barcelono) kaj E-Kultur-Centro (Tuluzo). Same valore kontri-



Tri el la mil
naŭcent
naŭdek ok
pakaĵoj

Komplezo de Humanitara Organizo Espero

Projekto 5 - Balkanaj Sunfloroj

Balkanaj Sunfloroj ("Balkan Sunflowers") organizas volontulojn el ĉiuj mondopartoj, laborantaj por mildigi la krizon de rifuĝintoj kaj helpi rekonstrui la regionon. Teknikaj aŭ medicinaj antaŭscioj ne necesas; plej gravas sento de solidareco. Kutime oni bezonas baze scipovi la anglan, sed eblas organizi E-lingvan laborgrupon. Kontakto Renato Corsetti (adreso en la kolofono), se vi emas tian partopreni aŭ kunorganizi. Se vi subtenas volontulon, vi povas esti certa ke vian monon oni uzos 100%-e por pagi ties vojaĝajn kaj restadkoston dum la laboro kun la rifuĝintoj. Subteno eblas pere de Konto Espero de UEA. Bv. klare indiki: "por Balkanaj Sunfloroj".

buis pluraj individuaj e-istoj. Interalie kelkaj tradukis la tekston al sia lingvo kaj provis vekti la intereson de neesperantistaj help-organizaĵoj. Aliaj (ekz.

Japana Esperanto-Instituto) estas nun kolektantaj monon por ĉi tiu agado.

En Bosnio la agado ricevis grandan atenton. La ĉefaj lokaj gazetoj plurfoje

jektojn, por Bosnio kaj por aliaj landoj. Ili ĉefe serĉas e-istojn kiuj povus kontaktigi ilin kun help-organizaĵoj neesperantistaj. Se vi povas tiel helpi, petu detalojn ĉe Hum. Org. Espero, M. Spahe, 10/II 71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino; ☎ +387/71/441-842; ☎ 441-843.

Plian fojon e-istoj pruvis ke ili ne estas senreagaj antaŭ homaj katastrofoj, kiujn nia mondo pli kaj pli spertas. Ni provas disvastigi la idealojn de la E-movado, kiu rifuzas "glavon sangon soifantan", sed samtempe provas ripari la damaĝojn faritajn de tiuj glavoj. Dankon al Humanitara Organizo Espero kaj al ĉiuj donacintoj. ★

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.

Eldonas: John Benjamins, Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Abonoj: individua €46,30; institucia €99,85.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Pri lingvaj homrajtoj en Seulo

Laŭ iniciato de UEA, Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) diskutis pri "Lingvo kaj homaj rajtoj" (Seulo, 10-15 okt.).

Pli ol 7000 partoprenantoj reprezentis pli ol 600 internaciajn organizaĵojn en konferenco kun la kadrotemo "NRO-j en la 21-a jc.", kiun organizis CONGO (platformo de NRO-j en konsultaj rilatoj kun UN), Plenumkomitato de NRO-j asociitaj kun la Departemento de Publika Informado de UN, kaj Societo de Tutmonda Kunlaboro de Universitato Kyung Hee.

UEA (en konsultaj rilatoj kun UN kaj asociita kun ĝia Departemento de Publika Informado) aktive partoprenis jam en la prepara stadio, helpe de sia korea landa asocio. UEA speciale koncentris sian agadon al unu el la kvin konferencaj temoj, "Homaj rajtoj". Kadre de ĝi okazis, iniciate de UEA kaj de Koalicio de NRO-j por Internacia Helplingvo (vidu jun. '97, p. 101), temgrupa sesio pri "Lingvo kaj homaj rajtoj". Ĝin gvidis Kep Enderby, prezidanto de UEA. Prof. LEE Chong-Yeong, prezidinto de UEA kaj prezidanto de Korea E-Asocio, faris enkondukan prelegon. Prelegis ankaŭ reprezentantoj de la Bahaa Internacia Komunumo kaj de la Ŭonbulisma Eklezio. ➔

Manifesto 2000: Ek al 100 000 000

Manifesto 2000, verkita de Nobel-pacpremiitoj, ne alvokas aŭ petas superajn instancojn: ĝi apelacias al la respondeco de individuoj.

Ĉiu homo havas la respondecon apliki al la realo la valorojn, sintenojn kaj kondutojn kiuj formas la bazon de la kulturo de paco, ĉar ĉiu povas agi por ĉi tiu celo kadre de sia propra viv-medio.

Manifesto 2000 estis prezentita en Parizo la 4-an de marto, por

kolekti subskribojn tutmonde. Oni celas prezenti 100 milionojn da subskriboj okaze de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2000. UEA dissendos ĉi-jare faldfoliojn por kolekti subskribojn. Jam eblas subskribi ĉe www.uea.org.

MANIFESTO 2000 POR KULTURO DE PACO KAJ SENPERFORTO


Konsciante pri mia parto de respondeco antaŭ la estonteco de la homaro, kaj tute aparte antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj, mi devigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia loĝ-loko:

- *respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ sen antaŭjuĝoj;*

- *praktiki aktivan senperforton, rezignante pri perforto en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psihologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj;*

- *kundividi mian tempon kaj miajn materiajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon;*

- *defendi la liberecon de esprimado*



kaj la kulturan mal-samecon, ĉiam favorante aŭskultadon kaj dialogon kaj ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj malakcepto de aliaj homoj;

— favori respondecan konsumadon kaj evoluon, kiuj konsideras la

gravecon de ĉiuj vivo-formoj kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo;

— kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno ankaŭ de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, cele al kuna kreado de novaj formoj de solidareco.

REZOLUCIO DE LA KONFERENCO "LINGVO KAJ HOMAJ RAJTOJ"

La Tema Grupo pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj de la Seula Internacia Konferenco 1999 de Neregistaraj Organizaĵoj rekomendas:

- 1) ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok) metu en la tagordon de sia proksima kunsido la temon "Lingvo kaj homaj rajtoj", kun la celo diskuti problemojn de tutmonda lingva politiko kaj la neniigon de homaj rajtoj kaŭze de lingva malegaleco;
- 2) ke tia kunsido konsideru la nomumon de komisiono por esplori la uzeblecon kaj praktikecon de internacia helpa lingvo;
- 3) ke Ekosok raportu al la Ĝenerala Asembleo de UN pri la rezultoj de ĝiaj mal-kovroj, kaj

- 4) ke tiu ĉi Seula Internacia Konferenco de NRO-j submetu la suprajn erojn kiel rekomendatajn proponojn al Ekosok kaj al la Jarmila Forumo de NRO-j, antaŭvidata por 22-26 majo 2000, por iliaj atento kaj sekva agado.

➔ La zorge preparita agado de UEA kondukis al bona rezulto. Post vigla diskuto la 35 partoprenantoj de la temgrupo unuanime rezoluciis pri rekomendoj al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (Ekosok) kaj al venonta Jarmila Forumo de NRO-j. La 15-an de okt. la rekomendojn adoptis la tema plenkunsido pri homaj rajtoj. (Vidu apude.)

Post la komuna seminario de UEA kaj la Alta UN-Komisiito pri Homaj Rajtoj en Ĝenevo (vidu jun. '98, p. 102), UEA denove sukcesis tiri en UN-medio atenton al la lingvaj aspektoj de homaj rajtoj. Tiel UEA realigas sian strategian celon kreskigi konscion pri tiu neglektata kampo. ★

Kongresa komunikado 1



85-a Universala Kongreso de Esperanto

Tel-Avivo, 25 julio – 1 aŭgusto 2000

Dato

La UK daŭros de mardo, 25 julio (inaŭguro: 26 julio), ĝis mardo, 1 aŭg. 2000. Ekskursita tago: sabato, 29 julio.

Kongresejo

La altklasa hotelo Dan Panorama (10 Kaufmann Str., IL-68012 Tel Aviv), ĉe mediteranea marbordo, ofertas la unikan komforton loĝi, manĝi kaj kongresi sub sama tegmento.

LKK

Eklaboris 20-kapa Loka Kongresa Komitato, kun prezidanto prof. Amri Wandel kaj sekretario Josef Šemer.

Tamen pri ĉiuj demandoj bv. korespondi *nur* kun la CO, ne kun LKK. Sama peto validas rilate la kongresejon.

Glumarkoj, afiŝoj

Glumarko estas bona maniero reklami pri la UK sur leterkovertoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA folion de 15 glumarkoj je € 1,35 (triona rabato ekde 3 folioj). Belaj koloraj afiŝoj estas riceveblaj kontraŭ afrankokostoj.

Unua Bulteno

Bela plenkolora broŝuro estas senpage havebla ĉe la CO.

Kongresa temo

La temo "Lingvo kaj kulturo de paco" kongruas kun la kadra temo de UN kaj Unesko por la jaro 2000, Internacia Jaro por la Kulturo de Paco.

Flugoj

Se vi mendas flugon pere de UEA, vi povas jam nun fari provizoran mendon, menciante kiel eble plej precizan itinaron de viaj flugoj (datoj, ekiraj kaj celataj flughavenoj). UEA klopodos baldaŭ fari oferton kun allogaj prezoj.

Loĝado

LKK zorgos pri loĝlokoj en ĉiuj kategorioj kaj pri transporto dumtage inter la hoteloj kaj la kongresejo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno en januaro.

Ekskursoj

Al Jerusalemo verŝajne eblos ekskursi ĉiutage. Kromaj celoj estos Nazareto kaj Galileo, Morta Maro, Qumran kaj Masada, Hajfo kaj la nordo, Centra Regiono de Israelo ktp.

Antaŭ- kaj post-kongresoj

Ili celos ankaŭ najbarajn landojn: Jordanio kaj Egiptio, kun vizitoj al la piramidoj, Kairo, Sinajo, Petra kaj Amano. En Jordanio estas antaŭvidataj apartaj aranĝoj por novicaj e-istoj arablingvaj. Oni organizas ankaŭ programon en Pac-oazo, komuna lernejo araba-juda. Cetere, en Israelo oni celas ekskursi al la Nordo (Galileo, Nazareto, Golano, Hajfo), Sudo (Eilat, Morta Maro, dezerto, valo de Jordano) kaj al sanktaj lokoj de la tri grandaj monoteismaj religioj (Jerusalemo, Betlehemo, Nazareto).

Infana kongreseto

Okazos en la internacia lernejo Hadasim, proksime al Netanjo — sed *nur se aliĝos minimume 20 infanoj*. Aliĝu kaj informiĝu ĉe kunordiganto Stefan MacGill (adreso en "Kalendaro", p. 191). Vidu ankaŭ la artikolon sur p. 188.

Aliĝoj

Ĝis 31 okt. ĉ. 300 aliĝoj el 45 landoj.

Kotizoj

Ĝis la jarfino (aliĝdato estas la alvendo de la pago), en eŭroj: individua membro de UEA (IM): 110 [landoj kun tarifo B: 82]; ne-IM 138 [103]; IM junulo/kunulo/handikapulo/komitatano: 55 [41]; samaj kategorioj ĉe ne-IM: 82 [62]. Junulo estas tiu kiu naskiĝis inter 70 01 01 kaj 79 12 31. Postaj naskitoj aliĝas senpage.

Purgatorio finiĝis en Slovakio

Post jaroj da organiza krizo, la slovakia E-movado nun pli bone fartas. Slovakia Esperanta Federacio (SKEF), fondita en 1997, aliĝis sekvajare al UEA. Ĝian prezidanton, Ján Vajs (46 j.), intervjuis Katarína Bodnárová.

■ Slovakio: bonfartan E-movadon skuas la jaro 1989; en 1994 ne plu ekzistas asocio reprezentanta la landan esperantistaron; en 1997 fondiĝas SKEF. Ĝia unua kongreso elektas Ján Vajs kiel prezidanton.

Fakte mi estis unu el la triopo (kun Lucia Fedorová kaj Juraj Gondžúr) kiu ekorganizis la fondon de SKEF. Mi estis funkciulo jam en la tempoj de Slovaka Esperanto-Asocio, unue kiel prezidanto de regiona organizo, poste kiel sekretario de la asocio (1990-93).

■ SKEF difinis 14 ĉef-taskojn por 1998-2001. Kiujn vi taksas plej malfacilajn?

Kreskigon de la membrobazo kaj altigon de la lingvonivelo.

■ Kaj kiuj laŭ vi plej gravas?

La praktika uzo de Esperanto, ĝia apliko en la ĉiutaga vivo, aparte en la merkato. Mi konsideras plie esperantisto tiun kiu uzas la lingvon ol tiun kiu nur konas ĝin.

■ Kiuj taskoj montriĝis plenumebldum la unua jaro?

Ni sukcesis remembrigi en UEA kaj refondi la revuon *Esperantisto Slovaka*. Tion eĉ dufoje, ĉar unue — en redakto kaj eldono de Stano Marček — pro financaj kialoj ĝi fiaskis. Nun ni jam havas la unuan numeron de *ES* eldonitan de la Federacio mem. [Vidu jul.-aŭg., p. 139.]

■ Kiel vi antaŭvidas la evoluon de nia movado en Meza kaj Orienta Eŭropo?

La e-istoj estas unue civilaj homoj. Movadumi estas nur unu parto de ilia vivo. Kiam ŝanĝiĝas la sociala konsisto de homgrupoj, de landoj, ŝanĝiĝas tie ankaŭ la E-movado. La spertoj montras saman evoluon ĉie en Meza kaj Orienta Eŭropo: unue la grandaj asocioj disrompiĝis je etaj partoj, kaj tiuj poste kuniĝis, sed je alia nivelo ol antaŭe. Tio validas ankaŭ por Slovakio. Bedaŭrinde, sur la malfacila transformiĝa vojo multaj valoraj e-istoj kabeis. Tamen mi kredas ke ili plej grandparte iam revenos.

■ Ĉu la SKEF-anoj ne sentas sin malhelpataj de la ekonomiaj muroj?

Unuflanke la manko de mono malhelpas la disvolvon de la Esperanta agado, sed aliflanke mono povas ankaŭ mortigi la belan ideon de Esperanto. Se la slovakia ŝtato donus nun al la E-movado multe da mono, la nunajn "idealismajn" esperantistojn tre rapide forpelus la monavidaj karieristoj. Bone estus ricevi ŝtatan subtenon po-parte, grade, tiel ke restu tempo defendi la internan moralon.

■ Kion eblas diri pri SKEF kaj internaciaj rilatoj?

Krei aŭ eniri internaciajn rilatojn estas malfacile. Unu el la kaŭzoj estas la manko de erudaj personecoj en nia nacia movado — mi jam menciis ke kabeis pluraj elstaraj homoj. Krome: nur malmultaj niaj aktivuloj aktivas internacie, kaj nur unu el ni havis eksterlandan praktikon. Ankaŭ junuloj ne abundas.

■ Do, ĉu vi pesimismas?

Malgraŭ la problemoj de la lasta jardeko E-o havas en Slovakio multjaran tradicion kaj profundajn radikojn. Post la nuna "purgatorio" nepre sekvos progreso. ★



Komplazo de Ján Vajs

Ján Vajs,
nova SKEF-
prezidanto...



...kaj
*Esperantisto
Slovaka*

Abontarifoj 2000 de la Libroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

Revuo	n-roj jare	jara abono
Amuze (distro, enigmoj, ludoj) <i>aerpoŝto ekstereŭrope</i>	6	18,00 6,00
Boletín (hispana)	5	25,00
Brazila Esperantisto (aere)	4	10,00
Brita Esperantisto, La <i>aerpoŝta aldono</i>	6	23,50 7,80
Bulgara Esperantisto	4	12,00
Dia Regno (KELI, aere)	6	12,00
El Popola Ĉinio (aere)	12	28,60
Esperantisto Slovaka	4	13,00
Esperanto Aktuell (germana)	6	15,30
Esperanto, L' (itala) <i>aerpoŝta aldono</i>	9	26,00 3,00
Esperantolehti (finna)	6	13,60
Esperanto sub la Suda Kruco (aŭstralia-novzelandia, aere)	6	23,70
Espero Katolika (IKUE)	6	29,50
Espero, La (sveda)	6	20,00
Fonto (literatura, aere)	12	27,25
Franca Esperantisto	11	30,50
Gazeto, La (kultura) <i>aerpoŝta aldono</i>	6	26,75 3,65
Heroldo de Esperanto <i>aerpoŝta aldono</i>	16	28,20 11,40
ICEM-Esperanto (Freinet-pedagogio)	4	18,30
Internacia Pedagogia Revuo	4	18,00
Jaro, La (agendo) <i>aerpoŝta aldono</i>	1	5,00 1,00
Juna Amiko (por lernejanaro)	4	10,80
Kancerkliniko, La (ajnista) <i>aerpoŝta aldono</i>	5	20,00 3,50
Kosmos (filozofia)	2	8,00
Language Problems and Language Planning <i>institucioj</i>	3	46,30 99,85
Lanterno Azia, La (korea, aere)	6	11,50
Literatura Foiro <i>aerpoŝta aldono</i>	6	26,50 7,55
Litova Stelo	6	12,00
Medicina Internacia Revuo (aere)	3	13,60
Monato (novajmagazino) <i>aerpoŝta aldono</i>	12	39,00 5,00
Norvega Esperantisto	6	10,00
Ondo de Esperanto, La (rusa)	12	22,00
Oomoto (religia/kultura, aere)	2	12,00
Rok-Gazet' (muzika; abono de 3 n-roj)	1	18,00
Scienco kaj Kulturo	6	25,00
Sennaciulo/Sennacieca Revuo	12	51,70
Simpozio (filozofia)	2	8,00
Starto (ĉeĥa)	6	9,00
TEJO Tutmonde	4	9,50
Tempo (kroata)	4	6,50

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio aldoniĝas imposto de 6%.

GAZETARAJ KOMUNIKOJ ABONEBLAJ

Jam de longe la CO dissendadas gazetaraĵn komunikojn pri E-novaĵoj. La komunikoj estas libere uzebaj en loka informado kaj senpage aboneblaj tra la UEA-paĝo <http://www.uea.org>.

Multaj el ili estas nun dissendataj ankaŭ angle kaj france, tra la listoj <http://www.egroups.com/group/esperantonews/> kaj <http://www.egroups.com/group/esperantonouwl/>.

Estus bone se ĉiuj landaj asocioj ekigus proprajn, nacilingvajn dissendolistojn, kun mikso de lokaj kaj tutmondaj informoj por ĵurnalistoj kaj aliaj interesatoj. Kelkaj tiaj listoj jam ekzistas, en la rusa eĉ du. Mi satus kolekti informojn pri ĉiuj funkciaj lokaj inform-listoj.

Kalle Kniivilä, estrarano pri informado

NAŪZA RASISMA KAMPANJO

Landaj Asocioj de UEA ricevis lastatempe anoniman koverton ekspeditan en Honkongo, kiu atakas la okazigon de UK en Israelo, la landon Israelo kaj la judan popolon, uzante en fuŝa Esperanto ekstreme krudan rasisman lingvaĵon.

UEA kaj la tuta E-movado toleras neniun formon de rasismo kaj malamo al aliaj popoloj. UK estas modelo al la tuta mondo pri amikeco kaj egaleco trans lingvaj kaj naciaj limoj. Jam en la unua UK Zamenhof difinis kiel ĝian plej esencan trajton ke en ĝi kunvenas "homoj kun homoj". Rasisma atako kiu rilatigas sin al UK, estas tial aparte naŭza.

Ĉiuj ricevintoj de la fia sendaĵo estas petataj transsendi ĝin, kun la koverto, al la CO por helpi ties klopodojn malkovri kiu estas malantaŭ ĝi. Per anonimeco la sendinto elstarigas sian poltronecon.

La plej taŭga respondo al tiu fiago estas pli aktive diskonigi la 85-an Universalan Kongreson, kiu estos la ĉefa kontribuo de la esperantistaro al la Internacia Jaro de la Kulturo de Paco, kaj mem aliĝi al ĝi.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

Kuneco ekumena

60 jarojn post fatala evento, Gliwice gastigis pacajn eventojn e-istajn.

Antaŭ 60 jaroj Hitler uzis la pretekston de "pola atako" al la radio-stacio de Gliwice por ataki Pollandon. En 1999 ĉ. 250 partoprenantoj de la 14-a Ekumena Kongreso kaj 3-a Junulara Ekumena Tendaro (7-14 aŭg.) povis foti la faman radioturon.

Kongresanoj venis el ĉ. 20 eŭropaj ŝtatoj, sed ankaŭ el foraj landoj kiel Ganao, Kamerunio, Niĝerio kaj Sud-Afriko. Ili sekvis programon de prelegoj, abundaj artaj eventoj kaj de ĉiutagaj mesoj kaj diservoj, interalie ekumenaj.

La kongreson kun-malfermis la helpepiskopo de Gliwice kaj urbaj aŭtoritatoj, alparolante parte en Esperanto. Letere salutis la pola ĉefministro, Jerzy Buzek, kaj la estro de la vojevodio.

Laŭ raportoj de Bogusław Sobol (La Ondo de Esperanto) kaj Simon Smits

Internacia Infana Kongreseto

La zumado pluumos

IJK-oj malsamas laŭ grando, sed similas laŭ viglo.



Se juĝi laŭ la dika programkajero de la ĵusa IJK, kun ĉef-rolulo Villi Abelo, la semajno en Potsdamio zumis je allogaj, praktikaj faraĵoj.

Ne eblas paroli pri la IJK sen menciigi Kristoforon Fettes, kiu dum 16 jaroj ĝin gvidis, kaj sindoneme dediĉis al ĝi multan tempon kaj energion. Li amas la infanojn, kaj ili amas lin. Li skribis al mi, kiam ni diskutis pri la IJK-buĝeto:

"Ni devas kompreni ke ne temas pri kongreso, sed pri infanoj". Profundan dankon al Kristoforo!

Amri Wandel



Klaras ke la sekva IJK en Israelo (dum la UK) pli modestos, sed ja viglos bonetose. Jam venis kelkaj aliĝoj kaj deko da interesiĝoj. Gepatroj aŭ instruistoj de E-parolantaj infanoj 6-13-jaraj anoncu sin, eĉ sen firma intenco partopreni en 2000. Ni sendos al ili rekte informojn pri ontaj IJK-oj kaj similaj aranĝoj.

La IJK okazos en la junulara vilaĝo kaj lerneja centro Hadassim, je 30 km de Tel-Avivo, apud Netanjo, sur 40-hektara tereno. Buso portos la infanojn de kaj reen al la UK-kongresejo, al tuttaga ekskurso kaj vizitoj al la maro kaj akvoparko. La IJK-ejo estas internacia lernejo, kun propraj manĝejoj, dormejoj, biblioteko, gimnastikejo, ekstera ludejo, naĝejo kaj komputilĉambro. La meza temperaturo estos 28-31 gradoj tage, 22 nokte.

Ni starigos IJK-hejmapaĝon lige al tiu de UEA (www.uea.org), pri ĝiaj celoj, historio kaj estonteco. Tie aperos krome demandoj pri hobiaj, hejmoj, dorlot-bestoj ktp, kaj infana babil-forumo por interkonatiĝi jam antaŭ la IJK.

Gepatroj kongresontaj en la UK: igu viajn infanojn aliĝi (kotizo ĉ. € 230) aŭ informpeti. Ili spertos unikan vilaĝ-rondon esperantujan. Ili mezu en la plu(z)umado!

Stefan MacGill, komisiito pri IJK
Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érde, Hungario;
✉ stefan.macgill@galamb.net

Tria fojo en Ĉeĥio

Post 1921 kaj 1994, jam la trian fojon Sennacieca Asocio Tutmonda kongresis en Ĉeĥio.

Al la 72-a SAT-kongreso en Karlovy Vary (24-31 julio) aliĝis 178 esperantistoj el 27 landoj.

Krom la internaj laborkunsidoj de SAT, kunveno de ties fakaj frakcioj kaj tradicia jarkunveno de TANEF

(naturamikoj), menciindas la fakaj prelegoj: i.a. de Stanjo Chrdlová (la loka ban-tradicio), Lucie Karešová (laboro kun menshandikapitaj plenkreskuloj), Yves Peyraut ("La lukto de sendokumentuloj en Francio"), Gilbert Ledon (ekonomiaj kaj socipolitikaj aktualaĵoj), Jean-Luc Tortel (la okcitana lingvo kaj la trobadora epoko), Alex Karkovsky (la blinda vojaĝanto-verkisto Eroŝenko), Kep Enderby ("Ĉu eĉ murdisto meritas ricevi justecon") kaj Vladislav Hasala ("E-o en poŝto kaj filatelo").

En muzika vespero brilis komponistopianisto-kantistino Elena Puĥova, akompane al Galina Staneŝnikova, kaj poste al Katerina Kudlíková kaj Miroslav Smyčka.

Kreŝimir Barković, Ret-Info

INTERESATOJ PRI SAT povas peti de la SAT-sidejo (67. av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio; satesper@cybercable.fr, <http://www.multimania.com/satesperanto/>) ekzempleron de la SAT-revuo *Sennaciulo*; la kotiztabelon de SAT; aliĝilon kun dorse ekstraktito el la Statuto de SAT. Dezirantoj de pli profundaj informoj povas ricevi ankaŭ la kompletan Statuton kaj la broŝuron *Kio estas SAT?*

Implicoj de nova epoko

Eniri en novan jarmilon signalas ne nur ŝanĝon de dato, sed eniron al nova epoko — epoko en kiu same facilas komunikiĝi kun homoj en foraj mondpartoj kiel kun samvilaĝanoj.

La implicoj por la E-movado estas radikalaj. Tradicie, novaj e-istoj unue iĝas anoj de loka klubo, kelkaj el tiuj en landa asocio, kaj kelkaj el ĉi ties anoj aktivigas pri E-o internacie: membrigas en UEA, ĉeestas en UK ks. Tio kreas piramidon, en kiu nur malplimulto de la e-istoj uzas Esperanton por la celo por kiu ĝi estis kreita: internacia komunikado. La plimulto ekzercas la lingvon kun samlingvanoj, faras sociajn kontaktojn kaj renovigas malnovajn amikecojn kun samlingvanoj ks. Uzo de Esperanto inter samlingvanoj ne estas malprobinda, sed E-o kutime ne plene vivas krom en kunteksto de diverslingvanoj.

La vivanteco de Esperanto: jen kio vere logas la publikon. Ĉe mencio de E-o, ĵurnalisto, parlamentano aŭ iu ajn unue volas scii ĉu ĝi vivas. Abstrakta parolado pri ĝia teorio aŭ gramatiko ne povas tiom konvinki kiel propraj spertoj pri situacioj en kiuj Esperanto estas evidente vivanta lingvo.

Estus dezirinde, do, ke tiu piramido inversiĝu. Se la ordinara esperantistoj frue havus kontaktojn internacie, Esperanto fariĝus ankaŭ por ili vivanta lingvo. La nombro de aktivaj uzantoj de la lingvo multobliĝus.

La nova teknologio ebligis tion. Per Interreto estos same

entute, aŭ ĉu la landaj asocioj aliformigos ilin al Interretaj informservoj: diskutejoj, novaĵejoj, oficialaj anoncoj?

Krome, por Interrete bazita organizaĵo la minimuma kotizo necesa por ebligi komunikadon kaj interŝanĝadon de novaĵoj estus ĝuste: nulo. Oni ja povus per kotizo dungi plentempan funkciulon, sed tiu, anstataŭ okupiĝi ĉefe pri administrado, librotendado kaj aliaj taskoj aŭtomatigeblaj, povus koncentriĝi pri kontaktado de

Tio starigas strategiajn demandojn ankaŭ por UEA. Nun ĝi havas eblon merkatumi pri si multe pli aktive inter la e-istoj. Krome, eblas pli efike komuniki kun la anoj, starigi diskutojn pri strategiaj demandoj, tuj informi pri estraraj decidoj ks. Ĉu tiel UEA signife gajnos anojn? Eblas ankaŭ prezenti sin en deca maniero al la ĝenerala publiko — kio tuj levos demandon pri lingvostategio. Kiujn lingvojn uzi? Ĉu elekto de iuj lingvoj ŝajnas lingva diskriminacio, subfosanta nian argumentadon pri justaj lingvaj rilatoj?

Oni ne povas ĝuste antaŭdiri kiel la afero evoluos; temas pri manipulado de merkataj fortoj, kiuj mem povos evolui en neatenditaj direktoj. En iuj landoj tiuj demandoj fariĝas jam aktualaj kaj gravaj. En landoj en kiuj eĉ mankas skribpapero por lernejoj oni ankoraŭ ne povas multe influi aferojn. Tamen en tiaj lokoj, tuj kiam iu en la komunumo havos Interretan aliron, homoj povos ricevi novaĵojn kaj leterojn el la tuta mondo same rapide kiel loĝantoj de evoluintaj landoj — kaj socie tio estos radikala paŝo. La nova pensado atingos ĉiujn.

Ian Fantom - Britio

<http://www.mintex.demon.co.uk/>

ian@esperanto.org

IAN FANTOM (1945), brita informsciencisto.



facile por nova e-isto eniri la tutmondan komunumon kiel por landa asocio. Eble la plimulto faros ĝuste tion. Tiukaze kaj la landaj asocioj kaj UEA devos reelpensi siajn rolojn en la nova epoko.

La baza ekzistokialo de iu ajn organizaĵo estas ebligi komunikadon inter homoj kun samaj interesoj kaj komunigi iliajn rimedojn, por atingi komune ion neatingeblan por la anoj individue. Interreta komunikado iĝas jam tre libera, kaj homoj ja grupiĝas neformale laŭ siaj interesoj. Distribuo de enlandaj novaĵoj iĝos tuja kaj senkosta. Ĉu do la oficialaj organoj malaperos

instruistoj, parlamentanoj, ĵurnalistoj, organizaĵoj; pri helpo al individuoj kiuj deziras starigi lokajn grupojn ks.


La granda demando do estas ĉu io tia okazos kadre de la landaj asocioj aŭ malgraŭ ili. Ĉu ekaperos Interrete grupoj de homoj kiuj konstatas ke tio kion oni tradicie lasis fari al la landaj asocioj nun estas efektivebla de grupoj de individuoj: ofte senkoste, pli rapide (ne necesas atendi komitatkunsidojn) kaj eble pli kompetente (ĉar temas pri entuziasmuloj). Aŭ ĉu la landaj asocioj adaptiĝos kaj mem kreas la kanalojn por tia Interreta aktivado?

Kalendaro 1999-2000

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fideindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro. Informoj aperintaj pli frue ne nepre estas ripetataj. La sekva kalendaro aperos en la marta numero.

novembro

- 11-14: **GRUPE-3**, Glivice-a rendevuo de uzantoj kaj praktikantoj de E-o, Gliwice, Pollando (Esperanto, PL-44-101 Gliwice, skr. poczt. 21; ☎+48/32/231-52-84; ✉staman@priv.onet.pl)
- 13-14: **E-staĝo**, Redon, Francio (H. Vincent*)
- 19-21: **Stud-semajnfino**, Castricum, Nederlando (Ton Verwoerd, Luxemburglaan 545, NL-1966 MJ Heemskerk; ☎+31/251/231-667; ✉vaganto@wish.net [R. Bijtenhoorn])
- 21: **12-a E-Renkontiĝo de Okcidenta Regiono**, Rio-de-Janeiro, Brazilo (EKOR, Cnel. Agostinho 126, Fundos, Campo Grande, BR-23050-360 Rio de Janeiro)
- 27: **11-a Malferma Tago de la Centra Oficejo**, Roterdamo (vidu anoncon sur p. 203)



decembro

- 03-05: **Renkontiĝo je Sankta Nikolao**, Murzasichle, Pollando (E-o – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad; ☎+421/92/32-419; ✉milanzvara@hotmail.com)
- 03-05: **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, Bratislava, Slovakio (Alica Komlóšiová, ESO, Rovníková 6, SK-82102 Bratislava; ☎+421/7/291-604)
- 10-15: **Zamenhofa semajno**, Kvinpetalo*, Francio
- 22 dec.-04 jan.: **12-a Konferenco de Internacia Komunista E-ista Kolektivo**, Havano, Kubo (Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell, Hispanio; ☎+34/9/37-27-50-21; ✉luis_serrano@mixmail.com)

- 27 dec.-03 jan.: **43-a Internacia Seminario**, Wetzlar, Germanio (Germana E-Junularo, Grellstr. 36, DE-10409 Berlin; ☎+49/30/42-85-78-99; ✉is.admin@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/is/1999/is99.html>; temo: "Jarmilo finiĝas – kio estas malantaŭ ni?")
- 27 dec.-03 jan.: **16-a Internacia Festivalo**, por familioj kaj personoj 25–55-jaraj, Münster, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎+49/5624/8007, <http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm>; temo: "Eŭropo")
- 28-31: **7-a Togolanda E-Kongreso**, Aneho (Unuiĝo Togolanda por E-o, B.P. 12.096, Lomé)
- 29 dec.-02 jan.: **Budapeŝta Silvestro**, Hungario (Esperanto, Tátra u. 4, HU-1136 Budapest; ☎+36/1/268-03-06, ✉268-03-31; ✉esperantohea@mail.c3.hu)
- 30 dec.-02 jan.: **Silvestra balo kaj Vintraj ekskursoj**, Poprad, Slovakio (E-o – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad; ☎+421/92/32-419; ✉milanzvara@hotmail.com)
- 31 dec.-01 jan.: **Novjara festo en Karpatoj**, Ukrainio (Jaroslav Zaharija, B. Hmelnickogo str. 82/4-8, UA-284006 Ivano-Frankivsk; ☎+38/3422/62-241)

februaro

- 03-06: **Ruslanda E-ista Kongreso**, Ĉeboksari, Ĉuvaŝio, Ruslando (RU-428000, Ĉeboksari, a/k 189, REK; ✉esperant@chits.ru; temo: "E-o kaj societo: ĉu reciproka influo aŭ pasiva konekzistado?")
- 15-19: **Inicado al E-o kaj Praktikado por komencantoj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Josée Lafosse)
- 22-26: **Preparado por la ekzameno pri kapableco**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Georges Lagrange)
- 25-27: **E-a Semajnfino**, Felixstowe, Britio (Roy L. Simmons, 61 Altmore Ave., East Ham, London, E6 2BZ; ✉rokeby@globalnet.co.uk; <http://www.globalnet.co.uk/~rokeby/esphome.html>)
- 26 feb.-07 marto: **3-a Internacia Himalaja Renkontiĝo**, Nepalo (Nepala E-Asocio, P.O. Box 10518, Kathmandu; ☎+977/1/410-725 [s-ro L.P. Agnihotri], ✉227-230; ✉sosierra@wlink.com.np)

marto

- 04: **Mezlanda E-tago**, Barlaston*, Britio
- 04-05: **E-staĝo**, Nantes, Francio (H. Vincent*)
- 04-09: **EoLA-12**, Naberejnyje Ĉelny, Tatarstano, Ruslando (SEJM, EK Gaja Krokodilo, RU-423819, Tatarstan, Naberejnyje Ĉelny, ab. ja. 133)
- 18-19: **Vintraj Tagoj de E-Asocio de Finnlando**, Rovaniemi (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-406330 Jyväskylä; ✉kari.kettunen@pp1.inet.fi)

aprilo

- 11-15: **Pri pedagogio**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Claude Gacond)
- 17-24: **16-a Printempa Semajno Internacia**, St. Andreasberg, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666; ✉psi@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/psi>; temo: "Eŭropo 2000 – Kunvivado de la generacioj oriente kaj okcidente")
- 18-22: **Praktikado de la lingvo**, Kvinpetalo*, Francio
- 21-23: **Semajnfino "E-o en Appleby"**, kun jarkunveno de E-Asocio de Britio (Morecambe E-Klubo, p/a F-ino F.M. Jay, 141 Slyne Road, Bolton-le-Sands, Camforth, Britio LA5 8AJ)
- 21-23: **Inaŭgura Kongreso de AIS-Meksiko**, Celaya-Guanajuato, Meksiko (Rubén Feldman-González, 120-A Rockwood Ave, MSC 40-716, Calexico, CA 92231, Usono; ✉103163.3356@compuserve.com)

2000

januaro

- 15-22: **41-a Internacia Fervojista E-Skisemajno**, St. François-Longchamp, Francio (Hubert Peyrouly, 6 Villa du Progrès, FR-94230 Cachan)
- 15-23: **16-a Aŭstralia Somerkurso kaj 3-a Kuna Aŭstralia/Nov-zelanda Kongreso**, Sidnejo, Aŭstralio (Terry Manley, 143 Lawson Str., Redfern, NSW 2016; ☎+61/2/93-19-47-75; ✉esperfed@ans.com.au; instruas LEE Jung-Kee, Franciska Toubale kaj Daniel Kane)
- 21-23: **Ni festivalu!**, Barlaston*, Britio

* ADRESARO Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaro rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

Barlaston: Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ✉372-393; ✉wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

Kvinpetalo: FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/5/49-42-80-74; ✉rapley@club-internet.fr

Vincent: Hélène Vincent, 3 rue Blaise Cendrars, FR-44100 Nantes, Francio; ☎+33/2/40-43-92-42

- 22-25: **55-a Kongreso de SAT-Amikaro**, Fouquières-les-Lens, Francio (Michel Bouchez, 66, rue E. Zola, FR-62740 Fouquières-les-Lens)
- 27 apr.-01 majo: **4-a Eŭrop-Unia E-Kongreso**, Oostende, Belgio (La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400, Oostende; ☎+32/59/502-708; temo: "Ekologio, ŝlosilo por la tria jarmilo")
- 29 apr.-01 majo: **59-a Hispana Kongreso de E-o**, San Lorenzo de El Escorial, ĉe Madrido (☐ festivanto2000@esperanto-es.org; temo: "Tutmonda kulturo")

majo

- 01-09: **Aroma Jalto**, Ukrainio (Volodimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kiev 133; ☎+38/044/295-17-01; ☐ ukrea@esperanto.nu)
- 13-19: **52-a Internacia Fervoja Kongreso**, Budapeŝto, Hungario (LKK, P.f. 7, HU-1378 Budapest)

junio

- 01-04: **Botaniko tra la regiona flaŭro**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ru Bossong kaj José Vinck)
- 10-12: **E-staĝo**, Préfaillies, Francio (H. Vincent*)
- 11-15: **22-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS**, Hradec Králové, Ĉeĥio (Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/319, DE-37077 Göttingen, Germanio; ☐ blew1@hrz.uni-paderborn.de)
- 14-21: **Internacia Ferio-Semajno de TANEF**, Ubedissen, Germanio (Abel Lingbeek, Fogelsanghstate 4, 7608 HJ Almelo, Nederlando)
- 22-25: **3-a Rendeŭo pri E-o kiel laborlingvo ĉe la kampo de sano**, Ribeirão Preto, Brazilo (Homeopatia Inst., Rua A. Brasilense 1418, BR-14015-150 Ribeirão Preto - SP; ☎+55/16/636-88-89; ☐ 636-50-65; ☐ lamasson@netsite.com.br, http://www.netsite.com.br/lamasson)
- 30 jun.-02 jul.: **Solidaraj Tagoj**, Saint-Chamond ĉe Liono, Francio (Clément Picard, 8 quai de Blondy, FR-69005 Lyon; ☎+33/4/72-07-04-19; ☐ festo@esperanto.org)

julio

- 03-07: **Someraj E-kursoj**, Civitana instituto de la ortodoksa monaĥejo Valamo, Heinävesi, Finnlando (Jukka Laaksonen, Uudenkylänkuja 2 B 11, FI-33530 Tampere; ☐ laakju@koti.tpo.fi)
- 05-09: **Kultura Arta Festivalo de E-o (KAFE)**, Tuluzo, Francio (EUROKKA, FR-31450 Donnevillle; ☎+33/5/61-81-95-95; ☐ eurokka@esperanto.org, http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/)



- 10-17: **Arkeologia laborbrigado**, Tuluzo, Francio (Claude Fressonnet, Canterate, FR-09600 Montbel; ☎+33/561/681-744)
- 15-21: **Internacia E-Konferenco de OSIEK**, Motovun, Istrio, Kroatio (Orbis Pictus, Via Leghissa 5, IT-34131 Trieste, Italio; ☎+39/40/767-875; ☐ orbispictus@iol.it; temo: "Multkultureco, multlingveco kaj kunvivado")
- 15-21: **34-a Konferenco de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj**, Kvinpetalo*, Francio
- 15-23: **73-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**, Moskvo, Ruslando (SAT, RU-105318 Moskva, ab. ja. 57; ☐ nikolao@orc.ru)
- 17-23: **7-a Kultura E-Festivalo**, Helsinko, Finnlando (KEF 2000, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki; ☐ kef2000@esperanto.fi, http://www.esperanto.fi/kef2000.html)
- 23-25: **1-a Nacia E-Kongreso de Malagasa E-Uniĝo**, Antananarivo, Malagasio (Justine Ralalarisoa, Lot. II C 72 FD Manjakaray, MG-101 Antananarivo)
- 23 jul.-01 aŭg.: **Internacia Somera Kurso**, Lesjöfors, Svedio (Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors; ☎+46/590/30-903; ☐ 30-309; ☐ egarden@esperanto.se)



- 25 jul.-01 aŭg.: **85-a Universala Kongreso de Esperanto**, Tel-Avivo, Israelo (CO de UEA; temo: "Lingvo kaj kulturo de paco"; vidu p. 186)
- 25 jul.-01 aŭg.: **Internacia Infana Kongreseto**, Hadasim, Israelo (Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd; ☎+36/1/452-37-37; ☐ 452-37-10; ☐ stefan.macgill@galamb.net; vidu p. 188)

aŭgusto

- 05-12: **56-a Internacia Junulara Kongreso (kaj 19-a Komuna Seminario)**, Honkongo, Ĉinio (LKK de IJK, P. O. K. 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☐ epc@china-report.com; temo: "Tutglobismo en la 21-a jarcento")
- 05-12: **Hungaria E-ista Semajno** (Esptur, Tátra u. 4, HU-1136 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ☐ 268-03-31; ☐ esperantohea@mail.c3.hu)

- 08-13: **Plurnivela Internacia Kursaro** (didaktiko) kaj **Kursoj por la unua kaj dua gradoj**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Kultura Centro E-ista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds; ☎+41/32/926-74-07; ☐ kce.esperanto@bluewin.ch)
- 12-18: **40-a Internacia Somerlernejo**, Barlaston*, Britio (prelegas Renato Corsetti)
- 15-20: **Plurnivela Internacia Kursaro** (literaturo) kaj **Kursoj por la unua kaj dua gradoj**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (vidu 08-13 aŭg.)
- 16-22: **16-a Internacia Simpozio pri E-turismo**, Budapeŝto, Hungario (Movilo, Soroksári út 117D, HU-1095 Budapest; ☎+36/1/378-27-93)
- 17-22: **3-a Eŭropa E-Festivalo**, Budapeŝto, Hungario (Hungaria E-Asocio, HU-1368 Budapest, P.f. 193; ☎+36/1/268-03-31; ☐ esperantohea@mail.c3.hu; vidu anoncon dorskovrile)
- 26-30: **69-a Itala Kongreso de E-o**, Calesalechio di Reno ĉe Bolonjo, Italio (Gruppo E-ista Bolognese "A. Tellini", via Miramonte 14, IT-40124 Bologna; ☎+39/51/644-66-75; ☐ beg.Tellini1912@esperanto.nu)



septembro

- 01-05: **Astronomio: inicado kaj praktiko**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Patrick Lagrange)
- 08-13: **Pri literaturo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ed Borsboom)

novembro

- 10-13: **KAEST 2000**, Kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko", Prago, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; ☐ chrdle@kava-pech.cz)

2001, julio

- 14-20: **74-a Kongreso de SAT**, Nagykanizsa, Hungario (Tibor Szabadi, P.f. 66, HU-8800 Nagykanizsa; ☐ esp.sz.tibor@sienet.hu)
- 21-28: **86-a Universala Kongreso de Esperanto**, Zagrebo, Kroatio (CO de UEA)

2002, julio

- 87-a Universala Kongreso de Esperanto**, Fortaleza, Brazilo (CO de UEA)

Reagoj



Papa medalo: ĉu merite?

Aljuĝi “medalon de toleremo” al Johano Paŭlo la 2-a (vidu jul.-aŭg., p. 122) mi taksas serioza eraro. La E-movado ja pledas por kaj vivas danke al principoj kiel paca kunvivado inter diversaj kulturoj, rajto je libera cirkulado de ideoj, interreligia kaj interfilozofia toleremo.

Ĉu mi rajtas diri ke tiujn principojn la romkatolika eklezio tute ne konsentas? La papo kredas je la ekzisto de absoluta vero, trudenda al ĉiuj ŝtatoj, por ke fine la volo de Dio regu sur la Tero. Tio neniel rilatas al toleremo, kiel montras la ekleziaj amas-komunikiloj, la provoj fari el Polio teokratian ŝtaton, instalado de monaĥinejo en la eksa koncentrejo Auschwitz, la cirkuleroj al la italaj episkopoj kontraŭ la disvastiĝo de aliaj religioj (ekz. budhismo). La nuna papo per sia tutmonda agado markis plurajn etapojn de malprogreso kompare kun la Dua Vatikana Koncilio: lia strategio estas influi la politikan debaton de aliaj landoj direkte al totalisma malpermeso de ĉio kontrasta kun la vatikana seksa moralo, kaj tion li faras per energio kiun li ne havas kiam temas pri multe pli tiklaj sociaj temoj.

Se ni volas esti kredindaj kaj vere aŭdigigi utilan voĉon, ni esperantistoj ne devas forgesi niajn principojn liberec- kaj ver-amajn, nek doni medalojn al la papo nur ĉar li “estas la sola ŝtatestro

en la mondo kiu publike uzas Esperanton”: ja gravas ne nur en kiu lingvo oni parolas, sed ankaŭ kion oni diras!

Daniele Vitali - Luksemburgio

Papa medalo: ĉu pro flato?

Mi ne kredis miajn okulojn kiam mi vidis la kovrilon (jul.-aŭg.) de la revuo de la neŭtrala UEA. Eĉ sen cerbumi ĉu la neeraripova estro de la katolika eklezio iam alvokis irlandajn aŭ kroatajn naciistojn al modero, la sola fakto ke lia senkompromisa kontraŭkondoma vidpunkto kondukas parton de la okcidentaj katolikoj en krizon, ne ŝajnas al mi marko de toleremo.

Verdire laŭdo de kanibalismo en *Esperantista Vegetarano* havus ĉe mi la saman efikon. Certe devas kuŝi malantaŭ tio la ideo ke flato al esperantema potenco igos lin favora al uzo de Esperanto. Sed eble mi eraras. Povas esti ke vi volas montri ke nia movado havas pli potencon satiran gazeton ol *La Kancerkliniko*, kaj tiukaze vi plene sukcesis.

Robert Pontnau - Francio
(delegito de UEA)

Red.: Kiel ajn oni opiniu pri Johano Paŭlo la 2-a aŭ pri lia toleremo, la papo estas eksterdube sufiĉe signifa persono por ke nia revuo ne rajtu ignori gravan Esperantan okazaĵon rilatan al li: la aljuĝon de medalo laŭ privata iniciato de esperantisto, d-ro Louis L. Zaleski-Zamenhof.

Niĉaj taskoj

Nia prezidanto prave atribuas (sep., p. 146) la sukcesojn de Amnestio Internacia kaj Greenpeace al ilia “kapto” de unikaj, grandaj “niĉoj”. Ni rimarku ke Amnestio trovis jaman problemon de vivo kaj morto, dum Greenpeace kreis sian niĉon per vigla, foje danĝera, hontiga agado. Tiuj du niĉospecoj haveblas ankaŭ al ni:

1. *Jamaj problemoj de vivo kaj morto*

1a. *Pli bona aviada lingvo*
Por taŭge elekti aviadan lingvon oni devas kompari kandidatojn, i.a. laŭ la

kriterioj de lernebleco, fidinda uzebleco (inter alilingvanoj) kaj longdaŭra stabileco. La angla malbonas laŭ la tri kriterioj, Esperanto estas bona. Jam okazis multaj

kraŝoj pro lingvaj kaŭzoj.

En 1951 oni simple trudis la anglan al la monda aviado sen kompara

provo. Nun mi postulas ĉe mia registaro kompetentan komparon. Tial ke aviada sekureco postulas la plej bonan lingvon, la registaro ne povos eviti tian komparon nun. Sendube Esperanto venkos. Tiam nia niĉa tasko estos salajre instrui proksimume 200 000



Frata signo sur la brusto

Dum la Berlina UK mi havis la impreson ke jam preskaŭ neniuj e-istoj portas la verdan stelon kaj ke malmultaj scias la tekston de nia himno. Mi eklernis Esperanton en 1928 aŭ 1929. Tiam la e-istoj ankoraŭ uzadis la insignon. Iam mi bezonis transiri la nederlandan landlimon kun valizo plenplena je libroj. La doganisto rigardis min ne kun afabla rideto. Eble li ne ŝatis mian veston franciskanan aŭ malestimis germanojn. Sed sur la brusto li portis la signon de universala frateco. Mi do alparolis lin en Esperanto. Subite lia vizaĝ-esprimo fariĝis amika, kaj ni familiare babilis. Poste mi eniris Nederlandon senprobleme, eĉ ne bezonis malfermi mian valizon.



Kiu nuntempe ankoraŭ portas nian insignon? Ivo Lapenna, eminenta, merito-plena esperantisto, vidis ke la troa

entuziasmo de kelkaj povas doni la impreson ke la esperantistoj estas aro da fantaziuloj. Pro tio li nelacigeble pledis por likvido de ĉiuj eksteraj signoj de interna entuziasmo. Unu konsekvenco de liaj aŭtoritaj vortoj estas ke la esperantistoj pli-malpli neglektas siajn simbolojn kaj Esperanto malaperas el la publika atento.

Ekscesa entuziasmo facile fariĝas ridinda. Aliflanke, entuziasmo absolute necesas por plivastigi nian idealon.

Samideanoj: kuraĝe kaj senhonte portu la verdan stelon!

Frato Bertino Goerner - Brazilo

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2000

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 51-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo.

Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al UK-ĉeesto. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, "Lingvo kaj kulturo de paco". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, "Lingvo kaj kulturo de paco". Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 1999. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2000. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2000. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La veraj nomoj kaj adresoj estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 190 eŭroj; dua premio: 133 eŭroj; tria premio: 76 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 133 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 399 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ retroŝte ĉe uea@inter.nl.net.

aviadistojn. Paralele ni devos krei sisteman terminaron kaj poste milionojn da paĝoj pri teknikaĵoj.

1b. Post-tremema lingvo

Tertremoj okazas dise tra la mondo. Savoskipoj tuj venas el pluraj landoj. Jen lingva konfuzo, fuŝa surloka kunlaboro. Dum la prokrasto centoj da viktimoj mortas.

Nia niĉa tasko estas atentigi registarojn kaj instrui E-on kiel dumkrikan lingvon al ĉiuj koncernatoj en centoj da urboj.

2. Kreota niĉo

Jen nur unu el multaj ebloj:

Hontigu UN pro malŝparo de publika mono en tradukado. Laŭ UNICEF 4000 infanoj mortas ĉiutage pro manko de vakcinado, koste de nur 36 milionoj da dolaroj jare. La traduka farso kostas pli ol 150 milionojn.

Jen niĉoj kiuj sufiĉe popularigos Esperanton. Ĉu nia esperantistaro pretas por tia tasko?

Kent Jones - Usono

Red.: Jones sukcese ekpuŝis la kampanjon por pli bona aviada lingvo ankaŭ en fakaj medioj, ekz. per sia artikolo "Broken English Can Break Airplanes" ("Anglaĵo balbuta, avio kaputa", 23 aŭg.) en la periodaĵo Air Safety Week.

Fia ero en nobla afero

Skribante pri solidarecaj iniciatoj (jul.-aŭg., p. 125), R. Corsetti esprimas intencon "transpaŝi limojn" inter esperantistaj kaj aliaj militsuferintoj. Deziro ja laŭdinda — des pli ŝoke estas se samtempe oni starigas aliajn limojn. Usonaj esperantistoj, dezirantaj doni studhelpan monon al juna militviktimo, formulis kriterion: "albano el Kosovo". Do, talenta esperantistido el alia regiono de Jugoslavio aŭ ne-albano jam anticipe estas rifuzita! Tia diskriminacia aliro el



etika vidpunkto ne multe diferencas de la fifamaj "etnaj purigoj". Sendube s-ro Onet kaj liaj kolegoj rajtas havi certajn simpatiojn kaj uzi laŭ tio la kolektitan monon. Sed mirinde ke tia unuflanka humanismo estas protektata de Konto Espero, do trovas legitimecon sine de UEA.

La malkaŝan etnan diskriminacion ne rimarkis la estimata vicprezidanto, kiu listigis la projekton kiel n-ron 1 (kaj tiun de veraj zamenhofanoj, kiuj "kompreneble ne distingas laŭ etnoj", kiel lastan), nek la redaktoro, kiu publikigis la artikolon sen kritika komento. Kie do estas la statuta neŭtraleco de UEA? Ĉu ĝi jam iĝis piedviŝa ĉifono?

Viktor Aroloviĉ - Rusio

Renato Corsetti: Konto Espero de UEA per sia propra mono efektive helpis kaj plu helpas esperantistajn viktimojn de militaj eventoj

aŭ naturaj katastrofoj sen distingo pri ilia nacieco, religio, lingvo aŭ flanko en kiu ili estis rilate al difinita milito.

UEA ankaŭ klopodas kunmeti kaj helpi ĉiujn projektojn kiuj celas mildigi la situacion de milit-viktimoj ĉie en la mondo. Kaj ankaŭ tion ĝi faras sen diskriminacio, tio estas, akceptante projektojn favore al ĉiuj militflankoj. Kompreneble, la starigantoj de la projektoj rajtas mem decidi kiun ili volas helpi.

Pro nura tempa hazardo (ordo de ricevo de la projektoj) la unua projekto celas helpi albanan orfon kaj la lasta klare deklaras ke ĝi "ne distingas laŭ etnoj".

La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de iliaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Forpasis "lingvisto pri lingvoj"

François Lo Jacomo - Francio

Mortis la 16-an de julio dojeno de la tutmonda lingvoscienco, André Martinet. Lia verkaro ne estas sen graveco por ni, esperantistoj.

Por lia okdekjariĝo, ni organizis feston en Sorbono kaj donacis al li bibliografion de liaj verkoj. Kiam li naŭdekjariĝis, la festo okazis en lia hejmo [vidu majo '98, p. 98], sed ni donacis interalie suplementon de la bibliografio. Ĉar eĉ post la okdeka jaro, li daŭre praktikadis lingvistikon, verkis artikolojn, gvidis seminarion...

Unu el la malpli ol dek plej famaj lingvistoj de la jarcento, André Martinet mortis la 16-an de julio. Li naskiĝis en Savoja vilaĝo la 12-an de aprilo 1908, kaj lia deveno donis al li ne nur personan kontakton kun loka lingvo, kies fonologion li modele priskribis (1945, '56), sed ankaŭ prudentan aliron al la lingva realo.

Lia lingvistiko ja estis "lingvistiko pri lingvoj": en epoko kiam plej multaj lingvistoj estis agregaciuloj pri gramatiko, li estis agregaciulo pri la angla lingvo. En 1937 li doktoriĝis per disertaĵoj lige al la fonologio de la ĝermanaj lingvoj, kaj diskonigis en Francion la Pragan struk-

turismon de Jakobson, antaŭ ol fondi sian propran funkciisman skolon, sian revuon *La Linguistique* (1965), sian Internacian Asocion por Funkciisma Lingvistiko (SILF) kaj ties jarkongresojn (1976)...

Fakte, lia vera fako estis fonologio, kaj aparte gravas lia libro *Ekonomio de fonetikaj ŝanĝoj* (1955). Sed ekgvidante la Sorbonan katedron pri ĝenerala lingvistiko (1955), li devis ĝeneraligi siajn teoriojn. Tial aperis, en 1960, lia plej fama verko,

tradukita en 17 lingvojn: *Elementoj pri ĝenerala lingvistiko*. Poste li eĉ provis, malpli sukcese, ataki ankaŭ semantikon, enkondukante diferencon inter *semantiko* kaj *aksiologio* paralelan kun la diferenco inter *fonetiko* kaj *fonologio*.

Lia instruado fondiĝis sur kelkaj klaraj bazaj principoj: ke lingvo estas



André Martinet en novembro 1998

unuavice parola komunika ilo, ke ĝi duoble dismembrigas en diskretajn unuojn (monemojn, mem kombinojn de fonemoj), ke "nenio estas strikte

Lingvo arton provokas

Ernst Leuze - Germanio

Eble ne estas tro malfrue publikigi recenzon pri la Internacia Vespere de la Berlina UK, precipe kiam la aŭtoro estas mem rekonata muzikisto.

Kiel novulo verki raporton pri grava vespero de internacia kongreso povus impresi arogante. Mi devas konfesi ke mi estis iom skeptika: kiel eblus starigi, el la propraj vicoj, programon por plena vespero, kiu espereble estos pli ol nur mucidesentimentala familia vespero Esperanta? Kio pezos pli — ĉu iu Esperanto-kulturo malkovrota de mi, ĉu la diverseco de la naciaj kulturoj sin renkontantaj ĉi tie? La unua manifest-

tis sin plej klare kiam aperis la kongresa koruso, kie mi havis la plezuron mem kunkanti. Kompreneble originalajn E-tekstojn — unue ĉiaman furoraĵon el la opero *Judas Makabea* de Händel, poste originalan komponaĵon de Dimitar Terziev, la multjara mentoro de la koruso. Bedaŭrinde la komponisto malsaniĝis kaj devis sendi anstataŭanton. La neatendita tasko ne malmulte perturbis tiun dum la ekzerco, tamen fine ĉe la prezento mem

li rikoltis honeste grandan aplaŭdon. La amplifilo de la grandega halo transformis nian hazardan muzikan trupon al celtrafa armeo.

Bedaŭrinde la teknikistoj opiniis ke ili devos asisti ankaŭ al la granda Steinway-piano, tiel ke la itala pianisto Aldo Fiorentin ŝajnis klavumi sur giganta gramofon-aŭtomato. Sed tion li vere ne meritis, ĉar sian pecon de Mendelssohn li ludis senmakule — por ŝatantoj de klasika muziko jen kulmino de la vespero. La pianisto bonvolis agi ankaŭ kiel akompananto, ekz. ĉe Brecht-kantoj de la Berlina kanzonistino Barbara Kellerbauer.

Longe for de tiaj pensoj oni estis ĉe la fabela Helena Puĥova el Moskvo, kiu profiligis sin ne nur akompanante la mezo-sopranon Galina Staneŝnikova, sed surprizis ankaŭ per propra kongres-

lingva kio ne povas varii de lingvo al lingvo” (li vigle kontraŭis la universalecajn modelojn), kaj, plej grave laŭ mi, ke “lingvoj ŝanĝiĝas *ĉar* ili funkcias”.

Jam junaĝe Martinet eklernis pri planlingvoj kaj anstataŭis Jakobson en kunsidoj de Internacia Helplingva Asocio (IALA). En 1946 li migris al Usono i.a. por fariĝi direktoro de IALA, sed pro malkonsento kun la antaŭa direktoro Gode kaj ĉefe pro la konvinko ke tia plano povus sukcesi nur kun helpo de financa povo, kiu mankis, li forlasis la aferon en 1948.

Martinet poste esprimis simpatian al E-o: li gvidis mian ĉi-teman doktoriĝon en 1981, partoprenis en la honoraj komitatoj de la Jubilea Jaro (1987) kaj de la UK en 1998, konsentis intervjuon pri E-o (1987) kaj mem petis de Umberto Eco ties konsenton (1993). Sed li daŭre opiniis ke sen forta ekonomia potenco planlingvo neniam universaligos.

Lastfoje mi vidis Martinet en pariza festo honore al la lingvistino Henriette Walter, la 10-an de nov. 1998. Lia forpaso markos la finon de lingvistika epoko: al pluraj generacioj de lingvistoj li instruis la elementojn de ilia scienco, en lia skolo regis familia etoso... nun restos liaj verkoj, dekoj da libroj kaj centoj da artikoloj, daŭre baza materialo por estontaj lingvistaj generacioj! ★

komponaĵo, kiun ŝi premiere mem kantis kaj samtempe akompanis. Granda entuziasmo ĉe la aŭskultantoj! Ke oni povas paroli E-on same flue kiel la gepatran lingvon, pruvis almenaŭ Katalin Smidélus el Hungario, la ĉiĉeronino tra la vespera programo. Sen falsa patoso aŭ simia imito de televido, ŝi vekis nian scivolon, ekzemple pri la pantomimo-parodio aŭ baleta kabaredo de Kim el Danlando. En vestaĵo meze inter eŭritmia kostumo, balet-jupeto aŭ negliĝo, prezentis sin al ni arta fajraĵo el danco-movoj, iam provokanta al rido, alian fojon elvokanta admiron, sed ĉiam fascina. Kategorio: nek Esperanta nek internacia, sed persona, originaleca. En similan direkton iris ankaŭ la prezento de koreino, kies signifo restis same kaŝita kiel la akompana bambua fluto, kiu brue siblis el

NAVIGE

TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



FAKAJ ASOCIOJ

Rozkoloraj paĝoj, neoficiala paĝaro de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, kun ties gazeto *Forumo*: <http://lsg.webjump.com>

LANDOJ, REGIONOJ

Dana E-Asocio kaj ĝia revuo: <http://www.Esperanto.dk/>
 Kolombia E-Ligo kaj ĝia retrevuo *Andaj Ondo*: http://members.tripod.com/Kolombia_Eo_Ligo/kel/
 Norda Francio: <http://home.nordnet.fr/~bdenetiere>

LITERATURO

Belartaj Konkursoj de UEA, listo de gajnintoj ekde 1982 (zorge de Sten Johansson): <http://www.angelfire.com/ok/stenjo/belartu.html/>
 Rusa prozo: Najbare al la revuo *La Ondo de Esperanto*, 15 prozaĵoj tradukitaj (de Ĉehov ĝis Solĵenicin), i.a. plenaj libroj eldonitaj ĉe Sezonoj, kiel *La morto de Ivan Iljiĉ* de Tolstoj aŭ *Kiel ŝtalo estis hardata* de Ostrovskij: <http://www.sezonoj.itgo.com/>

RADIO

Kelkaj aŭskulteblaj programoj: Esperanta Retradio (A. Oberndorfer): <http://start.at/retradio/>; Estona Radio: <http://www.er.ee/tallinn/espeesti.ram/>; Koreio, E-Radio Interreta: <http://esperanto-radio.net/knews.htm/>; Pola Radio: <http://www.wrn.org/audio/pol1.ram/>; Radio Saluton: <http://come.to/e.radio/>; Svedio, Radio Västerås: <http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm/>

REVUOJ

Penseo, beletra (kaj hejmpaĝo de MAO Zifu) translokiĝis al: <http://www.netbug.net.cn/~maozf/> aŭ <http://geocities.yahoo.com/Tokyo/5205>

NAVIGE EN NAVIGE


En oktobro ni dankis al Herman Deceuninck pro la lokado de la kompleta enhavo de antaŭaj “Navige” al <http://esperant61.free.fr/esperant14/navigex.htm/>. Fakte, la merito apartenas al Dominique Cornice.

la laŭtparolilo. Oni pli bone fartis kun la du polaj danc-ensembloj. Miriga la profesieco de la baleta trupo, kaj vere tuŝanta la korojn tiu junueca freŝo de la popoldanca grupo el Pollando. Mi, sudgermana vizitanto, subite konsciĝis ke post la granda “ŝanĝiĝo” ni havas grandan najbaran landon ne plu nur okcidente, sed kulture plej signifan kaj grandan nun ankaŭ oriente. Tre kortuŝis kantoj de la blinda Natalija Kasymova el Taĝikio en ŝia pitoreska kostumo. Fine ankoraŭ la gitaroj: temerare italo kuraĝis suriri la podion.

Li transvivis, kaj ankaŭ ni. Spiron de latineco komunikis grupo el Brazilo.

Kaj ekzotecon, ĉarmon kaj frapan kapablon ni spertis kun la duo Nataŝa kaj Ĵomart el Kazahstano.

Ofte oni diras ke muziko estas internacia lingvo. Sed kio efektive interligis la homojn, tio estis Esperanto. Sen ĝi, neniel povus okazi tia senperforta sinsekvo de tiel profunde malsamspecaj artaj formoj. Do, Esperanto estas ne nur arta lingvo, sed ankaŭ artisma lingvo — kiu arton ebligas kaj provokas, en diverseco — per unueco. ★



Recenzoj

Traduka belestro


Verko kian ni ne havis ekde *Infero*

Faŭsto. *Partoj I kaj II* (1808, 1831). Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832). El la germana trad. Karl Schulze (1910-83). Enkondukis kaj redaktis Ulrich Becker. Berlin: Mondial, 1999. 207p. 24cm. € 12,90.

"**K**aj ĉiam supren strebas la geni!" (v. 11675). Tiu ĉi versio el la majstroverko *Faŭsto*, nun finfine en kompleta traduko Esperanta, povus sinteze resumi la mirindan kaj admirindan vivoverkon de ties aŭtoro; homo kies konstanta strebo al lumo, al racio, al lucido ne malhelpis plej akran kaj realisman konscion pri la mallumo en la vivo ĉiutaga. El tiu kontrasto naskiĝas la plej tipe Goetaj etosoj, kaj ĝuste en tiu senco lia verko ankoraŭ modernas por ni, tiom ofte dubaj ĉu vere nia vivo kerne meritas nian strebon al plibonigo, socia agado, racia sinteno.

Al lia klasika sereneco neniam mankas la infero, eĉ kiam li ŝajnigas ke ĉio troviĝas sub plena rego de ordo kaj racio; liaj anĝeloj havas sencon nur kontraste al lia Mefistofelo. Kaj eĉ en "Prologo en la ĉielo" ni iom preterlegas la laŭdojn de Rafaelo, Gabrielo kaj Miĥaelo, kaj kaptas nian atenton la malpatoso de Mefistofelo, kiu tuj projekcias blagan lumon sur la ĉielan kortegon; li enpaŝas la paradizan scenejon per senkompata ironio pri la homo kaj pri Dio mem: en la homo li kritikas la racion, kiu devigas lin zorgi "pri ĉiu bagatelo"; kaj Dion li aprobas grandanime, kiel oni laŭdas afablajn, iom tro aĝajn sinjorojn ("La maljunul' foj-foje plaĉi povas, / kaj nepre mi evitas malakordon").

Tiu eksterordinara moderneco de Mefistofelo vere unuigas la unuan kaj la duan partojn de ĉi tiu dramo, kies verkado okupis la tutan vivon de Goethe. Cetere bone videblas la diferencoj inter la du partoj: la aŭtoro verkis la unuan kiam li estis juna kaj arda poeto, kiu ĵus impresis la mondon per *La suferoj de la juna Werther*, kaj li finverkis la duan malmultajn semajnojn antaŭ sia morto, jam universale rekonata kiel la plej granda vivanta verkisto.



Faŭsto inspiris i.a. operon, al Gounod. Prezento en Houston Grand Opera, Usono, 1996/97.

Johann Wolfgang von Goethe



Legi la unuan parton certe estas pli facile, ĉar troviĝas en ĝi en pli simpla formo la grandaj temoj de la germana kulturo tiutempa. En la dua fakte svarmas oper-similaj paradoj, pli intensa kaj ironia uzo de la antikva mitologio, kiun nur malmultaj povas unualege kapti kaj ĝui. Sed grandaj trezoroj troviĝas ankaŭ tie, se oni nur havas la forton kaj la emon elfosi ilin. Kaj finfine, la dua parto postulas leg-sintenon radikale malsimilan al tiu kiun oni havu por la unua, ĉar ankaŭ Goethe tre malsimilis tiam al sia dudekelkjara prototipo. Kiel dirus Mefistofelo, ĝuste en la dua parto: "...oldas la satan'." / Por lin kompreni, maljuniĝu!" (6817-18).

La protagonisto mem montras en si la sekvojn de tiu rompo, aŭ de tiu spirita evoluo. Tamen, ĉar ĉi tio estas ne komentario, sed recenzo, mi substreku nur kelkajn ecojn, kiuj persistas ĝis la fino. La plej evidenta estas la *ekstremismo* de Faŭsto. Li decidiĝas al la interkonsento kun la diablo ĉar li jam spertis ĉion, trastudis ĉion, kaj tamen rimarkas ke la *tuto* ankoraŭ komplete mankas al li; kiel Heraklito siatempe, li opinias ke multescio ne estas vera saĝeco, kaj do pretas rezigni ĝin. Tiu estas la senco de lia komenca monologo: "Jen mi nun staras, malsaĝul'!" (358). Li strebas al ĉiam pli granda posedo de la mondo kaj ne haltos ĝis li havos ĝin komplete en sia cerbo. Tiu strebo kondukas lin al magio, kaj poste al Mefistofelo, kaj ĉiam li strebas al grandioza posedo de la Tuto, lukto en kiu la vivo mem fulmrapide forbrulas. En la dua parto Faŭsto ririgardas al sia vivo kaj en mirinda monologo – la monologoj de Faŭsto ĉiam estas pintoj de la verko – priskribas sian sintenon (11433-39):

*Nur tra la mondo kuris mi,
Mi ĉiun emon kapti provis,
La nesufiĉan mi forŝovis,
La nekapteblan lasis for.
Min regis nur avido, nur plenum',
Kaj ree dezireg'; en palpebrum'
Traŝtormis mi la vivon...*

Tiu manko de memlimigo ŝajnas malklasika; helenoj nomis tiun pekon *hybris* kaj kondamnis ĝin. Paradoxse, la klasika Goethe savas Faŭston ĝuste pro tiu konstanta strebado. Mefistofelo eraris sian kalkulon; avido kaj scivolemo kondukas ne al infero, sed al paradizo, dank' al la helpo de Gretchen, tiu Beatrica-simila virina principo.

Aliflanke, Faŭsto luktas kontraŭ la metaforo. Oni diras en la dua parto ke "diabla estas l' arto de l' suflor'" (6400); kaj en la unua Goethe substrekas la diferencon inter la vortoj kaj la realaĵoj kiujn ili devus difini. En ironia tono, Mefistofelo instruas sian disĉiplon ke nur per vortoj, kaj per vortoj senbazaj, oni povas atingi la certecon: kaj tio plej bone vidiĝas en teologio. V. 1997-2000:

Per vortoj bone disputeblas,
Per vortoj tuj sistem' fareblas,
Je vortoj kredi tre konvenas,
De vort' eĉ joton vi ne prenas.

Temas kompreneble pri diablaj konsiloj... En eksterordinaraj versoj (1224-37) la unua ĉapitro de la evangelio laŭ Johano ("Komence estis vorto") ŝanĝigas senhalte en la traduko de Faŭsto por pli bone enfokusigi tion kio vere kuŝas sub la vualo de vortoj: ne la senco, ne la forto, sed la ago. Kaj per tiu deformato de la evangelia teksto Faŭsto samtempe montras sian malfidon je la lingvaĵo kaj sian emon al aŭdaca transsalto de ĉiuj teorioj, cele al konkreta modifo de la realo.

La kompleta E-traduko de ĉi tiu granda klasikaĵo de la eŭropa literaturo estas salutinda evento. Antaŭ Schulze ni havis presite nur la version de N. Barthelmess (Düsseldorf, 1923): nur la unuan parton, kaj eĉ nekompletan. La traduko de Barthelmess, kiun mi analizis kompare al Schulze, restas sur nivelo konsiderinde pli malalta. Schulze male legiĝas preskaŭ kiel originala versaĵo.

Sian politikon kiel eble plej strikte konservi la originalan formon Schulze mem traktas en grava enkonduka eseo. Kompreneble oni povas ankaŭ malkonsenti pri tiu tendenco; en E-o tamen ni havas tiom gravan tradicion pri regulaj versformoj ke traduko laŭ tiaj principoj havas plian kulturan pravigon. Kaj fakte, Schulze konfesas eksplicite sian koncepton ke Goethe aplikis tian "rimadmanieron, kiu estas konforma al la difinoj de *Parnasa Gvidlibro*. Do, ankaŭ mi gvidis min per ili" (p. 15). Tiu ŝajne paradoksa ideo de Goethe kiel parnasisto instigis Schulze al la morala devo de laŭeble rigore fidela metriko.

Kiu provis traduki laŭmetrike, scias ke ĉiupaŝe naskiĝas problemoj kaj necesas kompromisoj. Des pli admiringe, eĉ hero-ece, aspektas la entrepreno de Schulze. La rezulto estas tia verko kian probable ni ne plu havis de post *Infero* de Kalocsay. La traduko ne estas tute senmakula; tie kaj tie troveblas kelkaj malglataĵoj gramatikaj aŭ semantikaj, ie (ekz. en verso 1346) mankas akuzativo. Sed rimarki tiajn mispaŝetojn (kiujn eble la tradukisto okaze de persona eldono estus foriginta) signifus ke oni estas pedanta stultulo; la traduko impresas grandioze pro altnivela fideleco, parnasisma flueco kaj legeblo. Mi sentas la devon substreki la grandan intelektan honeston de Schulze, kiu dediĉis parton de sia eseo al komparo de kelkaj versoj de la originalo, ĉefe la plej famaj, kun sia traduko, por konkludi ke li ne sukcesis komplete redoni la impreson de la Goetaj versoj. Sed ni, legante la tuton, povas nur admiri kiel profunde li sukcesis sekvi la Goetan penson

kaj tamen donaci al ni tekston kun neniu spuro pri ĝia vojaĝo de la germana al Esperanto. Tiaj skrupuloj kaj honesteco aparte substrekindas en literatura mondo kie malklereco kaj diletantismo kredas atingi la genion per kelkaj neologismoj kaj tordita uzado de artefarita literatura lingvaĵo.

Prave Schulze rimarkas ke "rimado, la neceso trovi rimojn, estas unu el la centraj problemoj de la tradukado" (p. 14). En tiu Herakla laboro li pruvis sian altnivelan fantazion kaj montris ke oni povas redoni pli ol dekdu mil versojn kaj eskapi la kutimajn rimkliŝojn, tiel donante variecon kaj poluron al la traduko. Schulze permesis al si nur tiujn nepurajn rimojn kiujn permesas *Parnasa Gvidlibro*. Li deklaras ke la adasismo estas danĝero "kiu ĉiam embuskas kaj kiun eviti mi rigore klopodis" (p. 15). Tio ne veras en pluraj kazoj (ekz. 1132-34, 1997-98, 8820-21, 11437-38); krome eblus diskuti ĉu rimoj kiel *milvi*, *iam/kiam*, *io/tio* ktp. estas adasismoj aŭ ne. Ja veras ke en multaj versoj la tradukiston devigis al tio (kaj al eksterordinare altnombraj elizioj) la neceso sekvi la virajn versfinaĵojn de la originalo, kiuj foje daŭras dum multaj versoj. Sed, ĉirilate, la demando de Schulze, pri kiu li ne havis "kontentigan respondon": "Ĉu vere la fideleco al la vers- kaj rimstrukturo devigas la tradukanton fari tradukon, kiu sonas mal-

bele pro la multaj elizioj?" (p. 16) – nu, tiun demandon ni povas respondi nee: tiu devigo ne ekzistas, ĉar Esperanto tre malsimilas la germanan. Male tute veras la tuj posta deklaro de Schulze: la valoro de traduko "ne povas dependi nur de tio, ĉu ĝi sklave gardis la formon de la originalo ĝis en ĉiuj detaloj, sed ankaŭ kaj precipe de tio, kiel entute la poezia enhavo kaj impresivo de la originalo estas transigita al la traduko".

Tipografie, pluraj tajperaroj enfalis la tekston, sed ili neniam endanĝerigas la komprenon. La iom senordaj kovrilaj grafikajoj ne multe kongruas kun la verko. Oni tamen devas danki la eldoniston ke li kuraĝis donaci al ni tiun ĉi eksterordinaran tradukon, kiu nekompreneble kuŝis pli ol 15 jarojn en manuskripto. La volumon esence kompletigas detalema glosaro pri la dua parto (de Schulze mem) kaj enkonduko de Ulrich Becker pri la biografio de Goethe, pri la antaŭaj – partaj – tradukoj de la verko al Esperanto, kaj pri la vivo de la tradukinto. La enkondukon de Becker fermas grava "listo de la tradukoj de d-ro Karl Schulze", el kiu oni ekscias ke ekzistas i.a. 400-paĝa manuskripta traduko de *Lotte en Weimar* de Thomas Mann. Almenaŭ tiun tradukon oni ne lasu en tirkesto.

Mauro Nervi - Italio

Homaj rajtoj

Inferon funde prilumi

Timor. La plej granda ekstermejo en la mondo. Miguel Faria de Bastos (1942). Lisboa: Portugala E-Asocio, 1998. 67p. 24cm. € 6,80.

Malofte Nobel-premiito verkas prefacon por Esperanta libro: tion faris José Ramos Horta, aktivulo orient-timora, kunlaŭreato de la Nobela pacpremio en 1996, al la verko de advokato Faria de Bastos, multflanka Esperanto-aktivulo portugala. La aŭtoro ampleksigis al libro prelegon kiun li prezentis en la Adelajda UK (1997). Lia temo eĉ pli varme, sango-varme aktualas hodiaŭ, kiam la mondo spirretene (ĉu vere?) atentatas ĉu kaj kiam finiĝos la indonezia uzurpado de Orienta Timoro, kiu kaŭzis

la tutmonde plej grandan genocidon de la lastaj 60 jaroj: 308 mil homoj estis mortigitaj (p. 61), murdado laŭproporcie (44,3% de la loĝantaro) pli granda ol eĉ la holokaŭsto.

La libro estas angle-portugale-Esperante trilingva, tiel ke la tri partoj okupas nur po 13 paĝojn. Kromas 19 paĝoj da komuna apendico de tabeloj kaj grafikajoj. La teksto fluas en stilo iom baroka, tamen natura, kvazaŭ ĝi apartenus al ampleksa korpuso de homrajtaj tekstoj, kvazaŭ – ni diru – Amnestio Internacia eldonus siajn jarraportojn Esperante. La dankesprimoj (p. 45) malkaŝas ke "Gonçalo Neves... lasis sian majstran signon en la esperanta versio".

Kaj kiam ni legos nialingve same fundan prilumon de la konfliktofonoj ruanda, jugoslavia, kambaĝa, aŭ eĉ – pri la holokaŭsto?

István Ertl - Nederlando



Kontraŭ, sed ne por

Sur Parnaso. Timothy Brian Carr (1943). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1998. 119p. 21cm. € 12,60.

Kvazaŭ prilaborita juvelo ne povas havi nur unu faceton, vere signifa aŭtoro ne povas okupiĝi nur pri unu temo aŭ unu stilo en siaj verkoj.

Sur Parnaso konformas al tiu postulo. Sub unu titolo vi trovos ses kolektojn da nivelo kaj humore tre diversaj versoj — preskaŭ ĉiam pli-malpli klasikformaj sonetoj.

Carr akre reagis je la ofta malĝusteco kaj maljusteco de la nuna — “burĝa” — mondo kaj precipe Eŭropo. El tiu sento elkreskas 35 versoj de *Ĉe barikadoj* — arda alvoko kontraŭ... Sed ne por. Almenaŭ ne ĉiam klaras la proponataj ideoj — pri detruo, aliigo, perforta ŝanĝo, rompo, neniigo de l’ ekzistanta monda ordo. La proponoj povus eĉ timigi leganton el “eksurĝaj” landoj, tro bone memorantan al kio povas gvidi sloganoj similaj al *La feroculojn skuu kaj ŝancelu, / renversu, vipu, tretu kaj forpelu! / Rapidu, geherooj elradiaj!*

Kiel ŝajne ĉiam en verkoj plenaj de politiko, tie kaj jene troveblas ŝtonpezaj kunmetaĵoj kiel *mortigebriaj egomaniuloj*. Sed ekvilibrigas la aferon freŝegaj buntaj strofoj montrantaj al ni la plenan verspovon de Carr, “linioj-bildigoj” kreantaj per pokaj vortoj iluzion eĉan imagon: *Mi prikantu, Kaliopa, en literoj el neono, / dum li glutas Kokakolon, la titanon de dolaroj*.

Aparte brilas la parto *Krys*, se ne oficiale do humore dediĉita al... Jes, al *Krys*. *Mi miras, kara, ke vi brilas mia*.

Jen kelkaj koncizaj historioj: pri soldato kiu en paca tempo “atakas” nur fraŭlinojn, pri ĵaluzo amanto, donanta al forvojaĝanta amatino miskonsilojn pri ŝia aspekto — por ke aliaj viroj ne tro atentu pri ŝi — konsilojn, certe, vanajn: *Sed vin, karega, vane mi malmarmus / — vagabondino, vi Venere ĉarmus*.



Esperantujo temas plejparte pri okazintaĵoj kaj spertoj de la aŭtoro en Esperanta medio — do por leganto ne vizitinta ekzemple iun certan aranĝon en iu fora jaro, kelkaj frazoj restos iom misteraj.

Aliaj kolektoj estas multkolora tuko farita el ajnaj impresoj kaj ideoj. Jen dediĉo al deka Muzo: *Kun plumo plej solene en la mano / per inko jen! mi baptas vin Kinao*. Jen reklamo el venonta jarcento: *Provu revon! Ekposedu astron! / 100 asteroidoj*

serĉas mastron. Jen pri printempo: *Subnaze de l’ dogano reakcia / Printempo siajn sorĉojn kontrabandas...* Kaj ĉio estas trapikita per potenca kudrilo de Amo kaj Amoro: *Kaj ni babilis kaj ridetis / okul-enokule / ĉe sojlo de mirindaj kisoj*.

La lingvo de Carr ne estas facila, samkiel lian vortaron oni ne nomus malriĉa, sed por atenta ŝatanto de poezio mi deziras ĝuan legadon.

Ivan’ Naumov - Rusio

Futur’ neklaras

Moskvaro. Originalaj poemoj. Valentin Melnikov (1957), Klara Ilutoviĉ (1946), Solomon Vysokovskij (1933), Oĉjo Dadaev (1973). Kompilis kaj postparolis Nikolao Gudskov. Moskvo: Impeto, 1998. 96p. 20cm. € 3,30.

Elkvertiginte la recenzotan libreton, mi konfuziĝis: ĉu temas pri eraro, kaj la libro aperis en 1989? Laŭ la fizika aspekto ĝi ja povus esti eldonaĵo el la

ne plu ekzistanta lando kiun Ilutoviĉ ŝajnas sopiri: *La estonto senkuraĝigas, / Krimej regas, prezoj sufokas* (p. 40). Nur leginte tiujn versojn mi konsciis ke la poemaro de la Moskva kvaropo ja aperis en la nova Rusio, en “nova socio”, al kiu la iamaj sovetianoj devas alklutimiĝi kaj kiu

konfuzas: *La bildon mi ne komprenas. / Ĝi, eble, estas genia. / Kaj kio do min katenas: / Ĉu ĝia manko aŭ mia? (Ilutoviĉ, p. 41) aŭ malkontentigas ilin: La tempo estas nun severa... (Vysokovskij, vidu paĝon 58).*

Ankaŭ ĉe Melnikov renkonteblas konfuziĝo: *Futur’ neklaras — ĉu ĝis mort’ / ĝi daŭros — aŭ post jaro krevos* (p. 23), zorgo: *La viv’ min zorgigas konstante, / ensorbas min taga rutin’* (p. 11) kaj deprimio: *Ni vivas malgraŭ ĉio. Modestas la bezon’, / dezirojn vantaĵn ni facile bridas* (p. 10), dum Dadaev himnas al libero (p. 74, 77).

Vysokovskij (la plej maljuna inter la kvar) jam enuas pri revolucioj: *Refrenas sperto historia: / Teruras voj’ revolucia* (p. 54) kaj sekve turnas sin al religio, pri kiu li versas ĝisnaŭze. Ilutoviĉ (ankaŭ ŝi poezianta pri religio) reesprimas sian zorgon: *Nigra iĝis la viuperspektivo* (p. 47).

Generale tre deprimia poemaro, el kiu oni ja povus konkludi (haste kaj supozeble erare) ke la “novajn rusianojn” regas malespero: *Malfeliĉo la homon distretas* (Ilutoviĉ, p. 47).

Iom da optimismo povus redoni al la leganto la postparolo, kiu traktas la Moskvan skolon de originala E-poezio, kaj kiun aŭtoris la kompilinto, Nikolao Gudskov, al kiu ne mankas troigaj esperoj: “ni esperu, ke laŭ tiu ĉi kolekto oni povos favore juĝi ankaŭ pri la tuta Moskvo-aro”. Malfacile, Nikolao, sed ni provas...

Ionel Oneț - Usono



Laste aperis



Alico en Mirlando (1865). Lewis Carroll (1832-98). Ilustraĵoj de John Tenniel. El la angla trad. (1996) Donald Broadribb. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999 (2-a, korektita eld.). 78p. 20cm. Klasikaĵo de la infana literaturo. € 6,00.

Damnita lando. *Poemaro.* Petar Bašeski (1938). El la makedona trad. Nikola Uzunov. Prilep: E-Societo "La Progreso", 1999. 70p. ISBN 9989 878 45 5. 21cm. Poeziaj serĉadoj "kun tonnuanco sakramenta kaj malnovtestamenta". € 3,90.

De la edikto de Nanto ĝis la ribelo de la kamizardoj aŭ De toleremo ĝis fanatikismo. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1999. 43p. ISBN 2 906134 48 1. 21cm. Ĉapitro (1598-1710) el la historio de Francio. € 5,70.

Egipta dancistino, La. Tri erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren. El la nederlanda trad. Lode Van de Velde. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 95p. ISBN 90 71205 79 7. 21cm. La juna poeto Marko rakontas erotike al sia amatino Silvia, jam en kvara volumo. € 11,70.

Esperanto. Udžbenik medjunarodnog jezika. Lerno-libro de la Internacia Lingvo. Roget Imbert k. a. Red. Spomenka Štimatec. Zagreb: Kroatia E-Ligo / Izvori, 1999. 85p. ISBN 953 96918 4 2. 21cm. Baza kurso por kroatlingvanoj, laŭ la "Zagreba metodo". € 6,60.

Hejma vortaro. *Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto.* Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: UEA, 1999. 62p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Preskaŭ 600 nomoj de "ĉiutagaj aferoj" kun difino kaj kun ekvivalentoj en la angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda. € 7,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Historio pri nomigo de kemiaj elementoj en Esperanto. Jan W. Pióro (1926). Piastów: la aŭtoro, 1996 (2-a eld.). 21p. ISBN 83 904162 6 3. 21cm. € 1,50.


Invito al Esperanto. E. S. Perevertajlo (1938). Desegnis Rafael Matevosjan. Moskvo/Taškento: Impeto, 1999. 48p. ISBN 5 7161 0058 9. 29cm. Internacie uzebila lernilo por infanoj de 7 ĝis 9 jaroj, riĉe ilustrita. € 5,70.

Istruzione a distanza. L'insegnamento delle lingue a distanza. Principi ed esperienze. R. Corsetti, M. La Torre, D. Charters, I. kaj K. Schubert k. a. En la itala, kun resumo en 5 lingvoj, i.a. Esperanto. Roma: Tecnodid, 1997. 104p. 27cm. Numero de re-

vujo. Studoj pri malĉeesta lingvoinstruado, specife de Esperanto. € 9,00.

Kalejdoskopio. *Poemaro.* Viktor Galeski (1965). El la makedona trad. Nikola Uzunov. Prilep: E-Societo "La Progreso", 1999. 54p. ISBN 9989 712 88 3. 20cm. Kvindek da poemoj "koncizaj, elipsaj, delikate kaj lirike subombritaj". € 3,00.

De la praktikismo de Hejma vortaro kaj la reva mondo de Alico...



... ĝis
fajnaj
naturbildoj
el Flandrio
kaj politika
polemiko
el Italio.

Kanzonoj de Bilitino, La (1894). [Pierre Louÿs, 1870-1925]. El la franca trad. Petro Anselmo. Paderborn: E-Centro, 1990. 55p. ISBN 3 922570 66 6. 21cm. La verkaro de fikcia helena poetino lesba. € 2,40.

Kemia internacia vortaro kun *Enciklopedio de kemia nomenklatur*. Jan W. Pióro (1926). Piastów: la aŭtoro, 1998. 68p. ISBN 83 906828 2 6. 21cm. € 3,60.

Kiel kvin Piemontdialektaj poeziaĵoj nun havas sian Esperantan tradukon per du Eŭropanoj. *Du prelegetoj de ĜELOZO Karlo* (1933). Paderborn: E-Centro, 1992. 39p. 21cm. Pri la piemonta beleto, kun multaj specimenaĵoj poemoj en la piemonta kaj en Esperanto. € 1,80.

Krimoj de dio, La. *Kontraŭ-kristanaj prelegoj.* Sébastien Faure (1858-1942): *La religia evolucio*; Pri la krima absurdeco de la religioj. Johann Most (1846-1906): *La dia pesto*. Trad. el la franca Luis Carlos kaj F. Buokin (1911), resp. el la angla (?) Seaman Tarano (1932). Beauville: SAT-Broŝurservo, 1999 (2-a eld.). 32+19p. 21cm. € 1,80.

Logiko en kemia nomenklatur. *Kemisemiotiko.* Jan W. Pióro (1926). Piastów: la aŭtoro, 1998 (3-a eld.). 38p. ISBN 83 906828 9 3. 21cm. € 1,80.

Makedonaj perloj. *Cent kvindek popolaj kantoj.* Red. Ljuben Dimkaroski. El la makedona trad. Nikola Stranĝanski. Prilep: E-Societo "La Progreso", 1999. 335p. ISBN 9989 712 87 5. 11cm. Dulingva: Esperanta-makedona. Malgrandformata. Bind. € 12,00.

15 p. 202

Tranĉu el via Jarlibro la lastan paĝon



kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA! Ĝi ja estas
kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 1999
mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!



EŬROPO: Kvinlanda konsultiĝo

Po du delegitoj de la landaj E-asocioj de Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando kaj Slovakio konsultiĝis en Liptovský Jan (Slovakio, 17-19 sep.). Ili i.a. interŝanĝis spertojn pri akiro de subvencioj; interkonsentis propagandi, ĉiu en sia asocio, gravajn internaciajn aranĝojn de la aliaj; kaj akceptis rekomendon kiu "proponas al la decidpovaj organoj de unuopaj landoj kaj de internaciaj organizaĵoj esplori la eblojn ekuze ankaŭ la neŭtralan lingvon Esperanto kiel pontlingvon." (P. Chrdle)

KATALUNIO: Eŭroperspektivoj

Kadre de Kampanjo 2000, Kataluna E-Asocio organizis seminarion ĉe la Barcelona Unesko-klubo pri "La lingva problemo



BRAZILU: ESPERANTA FUTBALO

Po unu teamo de ses E-grupoj futbalturniris en Rio-de-Janeiro (18 jul.). La ludantoj kaj ĉeestantoj (ĉ. 80) donacis ĉ. 150 kg da nepereaj nutraĵoj al karitata institucio. (P. Carvalho)

en EU" (29-30 majo). Tri rondaj tabloj kunigis fakulojn kiel psikolingvisto Miquel Siguán, sociolingvisto Jordi Solé i Camardons, profesoroj Xavier Lamuela kaj Lluís de Yzaguirre, okcitanisto Jacme Taupiac kaj Umberto Broccatelli. Evidentiĝis konsento pri la nuna elstara rolo de la angla, sed ankaŭ pri perspektivoj por Esperanto, ekz. kadre de la projektoj NEIGHBOUR kaj RELAIS [vidu '98 apr., p. 69]. (L. Puig)

POLLANDO: Radio vintre

De 31 okt. (vintra tempo) la E-elsendoj de Pola Radio (<http://www.radio.com.pl/polonia/>) aŭdeblas je iom ŝanĝitaj frekvencoj: 09.30h – nur satelite; 14.30h – 7285, 7275 kHz + satelite; 19.00h – kurtonde kaj 7205 kHz; 20.00h – nur per satelite. (Ĉiuj horoj laŭ la monda tempo.) Pro la multaj petoj, revenas la vespera elsendo satelita (Eutelsat II F-6 13E [Hot Bird], 11.474 GHz, Hpol, sonportanto 7.38 Mhz).

MALTO: Akcepto en palaco

La "ĝentilo kaj amikemo [de la loka movado] reflarigas ian alilande delonge forperditan pionirecan guston, replonĝigante vin en etoson kie esti esperantisto estas mem lialo por fiero, kaj senpera kontakto kun alilandano, alte taksinda

privilegio", himnas Cristina de' Giorgi pri la 7-a Internacia Turisma Semajno en Malto (4-10 sep.). La Semajnon partoprenis 8 maltaj kaj 26 eksterlandaj esperantistoj el 8 landoj, inter kiuj la ĝenerala sekretario de UEA, Michela Lipari, kaj akademiano Carlo Minnaja.

La prezidento de la Malta Respubliko, Prof. Guido de Marco, akceptis la partoprenantojn en sia palaco. Dum la 40-minuta renkonto Lipari salutis lin nome de UEA kaj de la partoprenantoj; d-ro Carmel Mallia, prezidanto de Malta E-Societo, informis lin pri la loka E-societo kaj pri la aranĝo mem. La prezidento longe parolis pri lingvoj kaj fine bondeziris al siaj gastoj sukceson en ilia agado, celanta interkompreniĝon de la homaro. (C. de' Giorgi, Ret-Info)

La prezidento de Malto manprenas Michela Lipari. Inter ili staras Carlo Minnaja (maldekstre) kaj d-ro Carmel Mallia (dekstre).




MI ESTAS MOSTAFA RASMANI (vidu foton), irana, 31-jara elektromotoristo, bredisto de ornamfiŝoj, fizikstudinto. Mi serĉas esperan-



tistinon por edziĝi kaj vivi en ŝia aŭ mia lando. Se vi deziras, sendu leteron kun via foto al: P.O. Box 81495-136, Esfahan, Irano.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

MEMORIGAĴOJ DE SINMORTIGINTO – de Spirito Camilo Castelo Branco, pri sia vivo en Transmondo, 554-paĝa, eldonis Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz. Mendebla ĉe UEA.

HAVEBLAS ESPERANTA POŝTKARTO eldonita por la 90-jariĝo de la loka E-klubo (1 USD + 1 internacia respondkuponon). Jaroslav Liška, Sidliště Svobody 19/71, CZ-79601 Prostějov, Ĉeĥa Resp.

LICEO ZAMENHOF (LODZO) PETAS, por instigi lernantojn kaj persvadi instruistojn, sendi salutojn kaj gratuletojn por la datrevena festo de ĝia patrono. Bonvolu skribi al XXXI Liceum Ogólnokształcące im. Ludwika Zamenhofs, ul. Kruczkowskiego 4, PL-93-239 Łódź, Pollando.

BONVOLU SENDI DIVERSAJN GRATULAĴOJN okaze de la 20-a jubileo de la Esperanto-grupo "Lietzensee", DE-14057 Berlin, Herbartstr. 25. Ni prezentos ĉion ekspozicie dum publika festo la 18-an de novembro 1999. Dankon. Johannes Moser.



AULD: Prezidas PEN-Centron

Post naŭjara mandato de István Nemere, la Asembleo de la 23-membra Esperanta PEN-Centro elektis William Auld (75-jara en nov.) kiel prezidanton. (Nemere tamen restos vicprezidanto.) La nova ofico de Auld — kiun *La Ondo de Esperanto* honoris per la titolo "La esperantisto de la jaro 1998" pro la granda eĥo de lia kandidatigo al Nobel-premio —

helpos trovi pliajn apogojn ĉe neesperantistoj, unuavice aliaj PEN-centroj. (Heroldo Komunikas)



DIATTA: Bonvenon!

Filino de Alphonse Diatta (35-jara), aktivulo senegalia, Annaïs-Marceline naskiĝis la 11-an de septembro en Dakaro.

RAŤIĆ: La voĉo de la klientoj

La plej longeserva (1988-) Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Nikola RaŤić (42-jara), partoprenis la 10-an de nov. en Lisbono la kongreson de Internacia Konferenco kaj Kongresa Asocio (ICCA, forumo por organizantoj de internaciaj kongresoj kaj ekspozicioj) kiel ano de ties ĵus fondita Klientara Konsilio. Tiu konsilio ekestis laŭ iniciato de UEA, por reprezenti la asociojn kiuj okazigas kongresojn. Per tiu invito al RaŤić, ICCA rekonas la unikan sperton de UEA kiel "mastro" de unu el la plej longedaŭraj regulaj kongresoj internaciaj, en la kategorio de tiuj el kiuj ĉiujare okazas nur kelkdeko.

CHEN: Patrona prelego

La 8-an de julio CHEN Yuan, ano de la Patrona Komitato de UEA, honora prezidanto de Ĉina E-Ligo, fama filologo, prelegis en

la redakcio de *El Popola Ĉinio* pri "E-movado — granda provo en la 20-a jarcento". Antaŭ la prelego li estis gratulita pro la 81-a datreveno de sia naskiĝo. (EPC)



ETNISMO: Du deklarioj

Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (<http://Beam.to/IKEL>) urĝas en deklario lanĉita la 6-an de okt., jam pli frue sendita al la germania ambasado de Indo-


nezio, ke ĉi tiu lando "ĉiurime de kaj oficiale subtenu la realigon de la volo esprimita en la referendumo de enorma plimulto de la orient-timoranoj" (t. e. sendependiĝo). [Vidu ankaŭ p. 197.] La 12-an de okt. IKEL alvokis al kampanjo por la uŭaoj, indiĝena popolo kolombia, kiu "riskas eks-termon pro la decido (...) rajtigi la (...) petrol-kompanion Occidental Petroleum ekspuati la petrolon de [ilia] hejmgregiono".

POLITIKO: Esperanto-partio

La revuo *Esperanto EKO* anoncas ke fondiĝos la 15-an de dec. "Esperanto-partio" en Britio. Povos membri homoj voĉdonrajtaj en Britio. La partio celos "antaŭenigi Esperanton kaj la demokratiajn kaj homamajn valorojn ligitajn al ĝi." Adreso: The Esperanto Party, 43 St. Giles Close, Malden, Essex CM9 6HU Britio; ☎+44/1278/783-392; ✉office@esperanto-party.org.uk.

TEATRO: Espero en Varsovio

En la unua lundo de ĉiu monato, je 17h, Jerzy Fornal ludas E-teatraĵojn en la galerio Nusantara (str. Nowogrodzka 18A, Varsovio). De decembro ĝis junio sekvas: *Sopiro - Laboro - Espero* (Zamenhof), *Ani-aro* (H. Martinson), *La granda koncerto* (Fornal), *Virino - kvar bildoj* (E. Mieŝelaitis), *La arlekeno* (J. Korczak), *Apologio de Sokrato* (Platono) kaj *Babiladoj de bonhumora zamenhofano* (J. Ŝapiro). (HeKo)



BRAZILLO: Ĉiusabate

Fernando Marinho, delegito pri instruado en Petrópolis (260 mil loĝantoj), publikigis ekde la 8-a de majo jam 25 fojojn ĉiusabatan kolumnon en la urba gazeto *Diário de Petrópolis*. Inter liaj temoj estis hilelismo, la Manifesto de Prago, Bona Espero, la Berlina UK, Esperanto kaj framasonismo. Konsultebla (portu-

gale) ankaŭ pere de <http://www.esperanto.org.br>. (Brazila E-Ligo)

HUNGARIO: Pensi Esperante

La hungara semajna magazino *Hetek* aperigis la 25-an de sep. la artikolon "Homo kiu pensas en Esperanto", bazitan sur intervjuo kun István Ertl, redaktoro de ĉi tiu revuo. La verkinto, András Kánai, mem studas en la E-fako de Universitato ELTE.

NEDERLANDO: La kuna lingvo

La taggazeto *Rotterdams Dagblad* (pli ol 100 mil ekz.) raportis (17 sep.) kun foto, en rubriko simila al nia "Persone", pri la

BLINDULOJ: Gonin, Karvinen

Los ciegos en el mundo / The World Blind, monata revuo de Monda Blindula Unuiĝo, dediĉis en julio 4-paĝan artikolon al "Esperanto kaj internacia kunlaboro". La sekretario de MBU, esperantisto



Pedro Zurita, mem interparolis kun Raymond Gonin (Honora Membro de UEA, kunfondinto de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj). Samnumere ĝi raportis pri alta ŝtata distingo al UEA-komitatano Arvo Karvinen (vidu majo, p. 99), sen men-
cii lian e-istecon.

geedziĝo de nederlandano Henk Uittenbogaard (78-jara) kaj litovino Ginta Liatukaitė (43 j.): "la sola lingvo kiun ili povas kune paroli estas Esperanto".

Por pli grandaj kvantoj kontaktu NEL (Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo, Norvegio; esperanto@online.no).

NORVEGIO: Modela informilo

Norvega E-ista Ligo (NEL), konata pro modernaj elpaŝoj informadaj, eldonis 5-lingvan (E-o, angla, franca, norvega, rusa) informilon pri E-o, celitan por internaciaj kunvenoj kaj konferencoj. La konciza dokumento indikas kontaktadresojn multlande. Eblas reprodukti la folion anstataŭigante iun lingvon per alia. Oni povas peti de UEA specimenon.

ROTARIO: Sen limoj en Francio

En septembro la franca revuo *Le Rotarien* aperigis 4-paĝan artikolon de Eskil Svane, "Esperanto, lingvo sen limoj". (Mallonge)

SVEDIO: Gratulon al Nordin

Unu el la plej grandaj ĵurnaloj de Svedio, *Svenska Dagbladet*, duonpaĝe artikolis, fine de julio, pri la elstara Stokholma e-isto Ingemar Nordin, kiu 85-jariĝis la 8-an de majo. (La hirundo)

GERMANIO: Varbo subtenata

Freunde in allen Erdteilen ("Amikoj en ĉiuj kontinentoj") titoliĝas profesie dezajnita, riĉe ilustrita, 24-paĝa varba broŝuro de Germana E-



Junularo, kiu gaje radias la viglon karakterizan por la junulara E-movado. Ĉi tiu 7-a, plene re prilaborita eldono aperis kun subteno de la germana federacia ministerio pri junularo.

Laste aperis

☞ (daŭrigo de p. 199)

Pelto kaj dek kvar aliaj noveloj, La (1894-1907). Hjalmar Söderberg (1869-1941). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 75p. ISBN 91 973467 5 6. 21cm. Rakontoj de Stokholma verkisto, kies moral-dilemaj temoj ne restas ligitaj al liaj epoko kaj loko. € 6,30.

Se aŭskultas la animo. *Poemkolekto el la verko de Guido Gezelle* (1830-99). El la nederlanda trad. (1939) Hector Vermuyten. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 53p. ISBN 90 71205 80 0. 21cm. Kun biografia studo de Petro De Smedt. 22 verkoj de "la poeto de la bela flandra naturo, religia lirikisto" (Vermuyten), unu el la plej grandaj poetoj nederlandlingvaj. € 6,90.

Semiotiko. *Ĝenerala skizo. Indikoj pri semiotikoj de unuopaj sciencoj*. Jan W. Pióro (1926). Piaŝtów: la aŭtoro, 1996. 50p. ISBN 83 906828 3 4. 21cm. Dulingva: pola-Esp. € 3,30.

Senvuale. *Pri la pseŭdonimoj de Kálmán Kalocsay*. Ada Csiszár (1940). Budapest: la

aŭtoro, 1999. 25p. 21cm. Listo de pseŭdonimoj kun klarigoj. Kun bibliografio. € 1,90.

Skizoj por la eklezia historio de la reformacio kaj la kontraŭreformacio. János Csohány. El la hungara trad. Tibor Papp. Debreceno: E-Societo, 1999. 28p. ISBN 963 03 7295 9. 21cm. Duone pri la eŭropa, duone pri la hungara reformacio. € 3,00.

Slavonia arbaro. *Slavonska šuma* (1888). Josip Kozarac (1858-1906). El la kroata trad. Davor Klobučar. Zagreb: Kroata E-Ligo, 1999. 29p. ISBN 953 96918 3 4. 21cm. Dulingva. Amplena bildigo de la aŭtoro naskoregiono. € 3,30.

Sonĝodramo (1901). August Strindberg (1849-1912). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 80p. ISBN 91 973467 6 4. 21cm. El siaj dramoj la aŭtoro plej ŝatis ĉi tiun, kiu grave impulsis la ekspresionisman kaj absurdan arton teatran. € 6,30.

Sveda floraro. *Svedaj, Latinaj kaj Esperantaj nomoj de 838 plantoj sovaĝe kreskantaj en Svedio*. El pluraj fontoj kompilita de Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 63p. ISBN 91 973467 7 2. 21cm. Kolekto, ne proponaro. Kun indeksoj latina kaj Esp. € 5,40.

Zamenhof, hodiaŭ. *Diskutkajeroj 3*. Andrea Chiti-Batelli. El la itala trad. Umberto Broccatelli. Rotterdam: UEA, 1999. 20p. ISBN ISSN 1388-2252. 21cm. Provo adapti la lingvan homaranismon de Zamenhof kun la celo transformi la e-istaron en politikan movadon. € 2,15. Triona rabato ekde tri ekz.

GLUMARKO

85-a Universala Kongreso de Esperanto, 25 jul. – 1 aŭg. 2000, Tel-Avivo, Israelo. Rotterdam: UEA, 1999. € 1,35 (folio 15-opa). Triona rabato ekde tri ekz.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!



LITERATURA FOIRO 30-jara

La plej longe aperanta beletra E-revuo, *Literatura Foiro*, festis sian 30-jariĝon la 5-an de sep. en Vraca (Bulgario), kun regalo de ĉefred.

Ljubomir Trifonĉovski, kaj 5 tagojn poste dum Literatura Tago en Budapeŝto, kie Giorgio Silfer prelegis ĉe Univ. ELTE. (Heroldo Komunikas)

KELKLINIE

• **Jorge Camacho**: aperis liaj noveloj *Deziro* kaj *Rúbens*, en paralelaj tekstoj Esperanta kaj itala (trad. Federico Gobbo) en *Additions*, "revuo por estontecaj verkoj kaj verkistoj de l' estonteco".



Stanley Kubrick


NOVELO LARĜE TRADUKITA

Spektantoj de *Eyes wide shut* ("Okuloj larĝe fermitaj"), postmorte lanĉita filmo de Stanley Kubrick, eble rimarkis ke la scenaro baziĝas sur *Sonĝonovelo* de Arthur Schnitzler — verko kiu jam aperis en Esperanto, en traduko de Michel Duc Goninaz (Kava-Pech, 1997; € 7,80).

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

11^A MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de novembro 1999 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gasto:
HUMPHREY TONKIN



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

• **Monato**, la Esperantlingva novaĵ-magazino el Antverpeno, aperas ekde septembro kun refreŝigita paĝ-aranĝo. Abono: vidu "Abontarifoj", p. 187.

• **Mikaelo Giŝpling** severe sed favor-konklude analizas la tradukojn de la jubilea Puŝkin-volumo *200 jaroj*, sur 8 paĝoj (99/4) de la Moskva revuo *Scienco kaj Kulturo*.

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: Yvonne van der Hork. Japanio: KITABAYASHI Hiraku. Belgio: Alex Humet.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Francio: Yvette Vierende. Portugalio: José Manuel Gaspar Martins. Usono: Gertrude Novak.

DONACIOJ 1999 (EUR)

ĝis la 15-a de oktobro

Fondaĵo Afriko: Nederlando: J. H. ter Braak 45,38; F. D. van Zoest 11,34. Svedio: J. Hammarberg 34,20. Sumo ĉi-jara: 10 848,78.

Fondaĵo Ameriko: Svedio: J. Hammarberg 22,80. Venezuelo: J. E. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara: 3182,97.

Fondaĵo Azio: Aŭstralio: H. Green 35,35. Ĉinio: E. Li 10,10. Italio: E. Tantin Ackermann 20,20. Japanio: H. Egawa 18,36; K. Esaka 18,37; E-Rondo de Ehime 18,36; E-Rondo Senboku 18,36;

K. Gotou 18,36; H. Gotou 18,37; T. Huzita 18,37; H. Ie 18,37; K. Lino 91,83; M. Iwai 18,37; T. Kobayasi 18,36; T. Maekawa 18,37; N. Miyazawa 36,73; T. Nomura 18,36; H. Onda 18,37; K. Sanpei 18,37; Y. Sawada 45,91; Z. Sibayama 36,73; T. Tadaisi 18,37; M. Tamura 25,44; K. Ueno 18,37; K. Yano 18,37; Y. Yazaki 18,36. Korea Resp.: C. Lee 25,25. Vjetnamio: N. B. Hoang 10,10; D. L. Nguyen 3,67. Sumo ĉi-jara: 2463,50. **Fondaĵo Kanuto**: Finnlando: H. Kesälä 10,00. Germanio: H. G. Strauss 51,13. Hispanio: J. Raposo Montero 6,81. Japanio: A. Morita 150,00. Nederlando: Anonime 39,93; N. C. Kuiterman v. Goor 10,00. Norvegio: K. P. Hoff 10,00. Usono: L. C. Harmon 10,00. Venezuelo: M. Bachrich 50,00. Sumo ĉi-jara: 4116,99.

Konto Espero: Francio: A. Tailpied 12,21. Germanio: H. G. Strauss 51,13. Japanio: Y. Aida 30,28; S. Aikawa 60,55; H. Akaiwa 30,27; H. Egawa 30,27; H. Inumaru 123,85; M. Isaki 60,55; Y. Itou 30,27; K. Kazawa 60,55; I. Kitagawa 30,27; T. Lin 90,83; K. Murata 30,27; T. kaj H. Nakada 27,73; Z. Sibayama 30,28; S. Yamato 30,28. Kanado: P. Ronald 22,43.

Nederlando: Faulhaber-semajnfino 181,25; F. D. van Zoest 11,34. Sumo ĉi-jara: 5258,00.

Junulara Fondaĵo: Francio: G. Letzgus 18,15. Sumo ĉi-jara: 1070,13.

Fondaĵo Officeja Ilaro: Anonime 385,00. Sumo ĉi-jara: 1525,93.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Finnlando: H. Kesälä 10,00. Hispanio: J. Raposo Montero 6,81. Japanio: E. Miyoshi 95,60; A. Morita 150,00. Nederlando: N. C. Kuiterman-van Goor 10,00. Norvegio: K. P. Hoff 10,00. Sumo ĉi-jara: 1015,76.

Volontula Fondaĵo: Aŭkcio UK Berlino 1326,42. Brazilo: J. R. Piton 16,14. Finnlando: H. Kesälä 10,00. Hispanio: J. Raposo Montero 6,81. Italio: C. Gubbio Carioli 108,91. Japanio: A. Morita 100,00. Nederlando: N. C. Kuiterman-van Goor 10,00; F. D. van Zoest 11,34. Norvegio: Kjell kaj Aase Gustavsen 3663,00; K. P. Hoff 10,00. Usono: L. C. Harmon 10,00. Sumo ĉi-jara: 8052,23.

Ĝenerala Kaso: Nederlando: F. D. van Zoest 22,69. Sumo ĉi-jara: 3781,28.


Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nadia N. ANDRIANOVA (1921-1999), 25 jarojn fakdelegito pri literaturo kaj ĵurnalismo en Kievo (Ukrainio), mortis antaŭ nelonge. Verkisto, ĉefe poeto, ŝi publikigis recenzojn kaj tradukojn el la rusa kaj ukraina en *Paco, Hungara Vivo* kaj aliaj E-revuoj; tradukis kaj redaktis la poemaron *Liriko* de Lesja Ukrainka (1971) kaj *Ukrainaj popolaj fabeloj* (1983). En 1987 Hungara E-Asocio eldonis ŝian "lirikan aŭtobiografion" *Vagante tra la mondo maltrankvila*.

Julija BELTRAM (1914-1999) mortis la 28-an de junio en Beogrado (Jugoslavio). Flegistino, ŝi okupiĝis pri rilatoj inter la Esperanto-movado kaj Ruĝa Kruco. Ŝi estis distingita per la plej alta ordeno de Internacia Ruĝa Kruco, la medalo Florence Nightingale.

Marion E. BIGELOW (1904-1999), dumviva membro de UEA kaj de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, delegito en Fresno, forpasis en Reedley (Kalifornio, Usono) la 20-an de julio.

Freddy BOSMANS (1939-1999), iama delegito pri pentrarto kaj vegetarismo en Ferrières (Belgio), aktiva en la 70-aj kaj 80-aj jaroj en rondoj ekologiismaj kaj vegetaranaj, forpasis lastatempe.



Valentinas ČEPKUS (1937-1999), litova kantisto konata pro sia kasedo *La sankta fajreto* (1997), mortis la 17-an de aprilo.

Piero FERRARA (1940-1999), delegito pri brikfarado kaj skoltismo, forpasis en San

Lorenzo di Savena (Italio) la 17-an de septembro. Longdaŭra membro de la Bolonja Esperanto-grupo, li agis precipe en la skolta medio.

Margaret G. HALLER, kies doktora tezo *The Esperanto language as a literary medium* ("La Esperanta lingvo kiel literatura perilo", 1970) pionire donis scienca pritrakton historian de la Esperanta literaturo en la angla lingvo, forpasis la 23-an de aŭgusto 1997 en Denver (Kolorado, Usono).



ARKIVO DE UEA

Ólafur HALDÓRSSON (1907-1999), iama delegito en Akureyri (Islando), mortis lastatempe.

Zdenko KŘIMSKÝ, iama sekretario de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (1973-85) kaj komitatano de UEA (1980-86), forpasis la 22-an de julio, 65-jara, en Mělník (Ĉeĥio), kie li servis pli frue kiel delegito. Pro lia merito ĈEA akiris sisteme urbocentran oficejon en Prago, kiun li renovigis kaj ekipis.

Ivica LEŠKOVIĆ, kroata esperantisto kiu pereis 24-jara en milito, en septembro 1991 (vidu p. 140, jul.-aŭg. '92), estis identigita en amastombo kaj enterigita en Zagrebo la 27-an de septembro. Lia sorto inspiris unu el la rakontoj de *Kroata milita noktlibro* de Spomenka Štimec.

Conrad MRASEK (1919-1999), lerninta E-on kiel 9-jarulo, fakdelegito pri turisma varbado ekde 1955, forpasis en Nurenbergo (Germanio) la 19-an de aŭgusto.

Philemon NGANGU (1974-1999), filo de la konga aktivulo Nduantoni Nangu, mortis la 26-an de junio. Li lernis Esperanton nur 8-jara kaj fariĝis Esperanta kantisto de la Evangelia Centro de Elaŭdataj Preĝoj.

Prof. NISIUMI Tarou (1912-1999), dum jardekoj delegito pri sociaj sciencoj, muzeoj kaj tenis, iama estrarano de Japana Esperanto-Instituto (1971-74), forpasis la 28-an de julio en Tokio.

Umid RAHMATULLIN (1954-1999), konata Esperanto-aktivulo en Samarkando (Uzbekio), forpasis en septembro.

Karel van RIJCKEVORSEL, dumviva membro, iama nederlanda parlamentano kaj honora ministro, mortis la 13-an de oktobro en Hago, en la aĝo de 86 jaroj.

TURUNO Rokurô (1910-1999), delegito en Kumamoto (Japanio), esperantisto de 1932, mortis la 16-an de aprilo. Oto-rino-laringologo, li ofte partoprenis Medicinistajn Esperanto-Konferencojn kaj instruis akupunkturon en internaciaj kursoj Esperantaj. Li postlasis nefinitan E-lingvan libron pri akupunkturo.

Nils UTNE (1922-1999) forpasis la 10-an de junio en Trondheim (Norvegio). Li servis kiel estrarano de Grupo Esperantista de Trondheim 50 jarojn, kiel delegito loka kaj faka (pri aŭtomatigo) dum pli ol 40 jaroj; li estis komitatano de UEA (1980-83) kaj konsilanto al la estraro de Norvega Esperanto-Ligo, instruis korespond-kurse, kaj membris en la komitato preparanta novan vortaron norvegan-Esperantan.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (kulturo kaj landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyôto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

3a Eŭropa
Esperanto-Festivalo



Budapeŝto
17-22 aŭgusto 2000

Venu al Hungario

*kaj ĝoju kun ni en esperantista etoso la
1000-jaran datrevenon de la hungara ŝtato.*

Abundaj kaj unikaj programoj!

La temo de la 3a EEF estos:

- *Propono por Eŭropa Unio pri komuna lingvo de civitanoj.*
- *Dek jarojn post la falo de "fera kurleno" – esperantistaj spertoj.*
- *Opinioj pri hungaroj en eksterlando.*

*Kiel kutime krom la konferenco okazos ankaŭ varia kultura
programo, ekskursoj al la pitoreskaj regionoj de Hungario.*

Hungaria Esperanto-Asocio

HU-1368 Budapeŝt, Pf.193. esperantohea@mail.c3.hu

Takso: (36-1) 268-03-31


ANONCO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

LAŬ GAZETARA KOMUNIKO DE LA 17-A DE MARTO 1997-A LA TIAMA ESTRARO, DUM KUNSIDO EN BAZELO, DECIDIS LA 24-AN DE JANUARO 1997 INTERALIE "SUSPENDI KOLEGON HAUPENTHAL EL ĈIUJ RAJTOJ KAJ DEVOJ DE AKADEMIANO, TIEL LONGE KIEL DAŬROS LA ENKETO". KONSULTINTE LA ALIAJN ESTRARANOJN, LA PREZIDANTO KONSTATAS, KE TIA SUSPENDO HAVAS NENIAN APOGON EN NIA STATUTO, KAJ SEKVE DEKLARAS ĜIN NULA.

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

**KIO NI ESTAS KAJ KION
NI CELAS.** Red. O. Buller
kaj R. Corsetti. Rotter-
dam: UEA, 1999. ISBN
92 9017 061 1. 24p.
30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la
Manifesto de Prago: demokratio,
transnacia edukado, pedagogia
efikeco de Esperanto, plur-
lingveco, lingvaj rajtoj, lingva
diverseco kaj homa emancipiĝo.



LA ONDO DE ESPERANTO

Ĉiumonata soci-kultura revuo kun literatura suplemento jarfine

- ☐ Tra Esperantujo: Faktoj, problemoj, komentarioj
- ☐ Tiel ni vivas: Raportoj el la postkomunisma mondo
- ☐ Civilizo: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- ☐ Esperanto: lingvo, komunumo, kulturo
- ☐ Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- ☐ Mozaiko: konkursoj, kvizoj, krucvortnigmoj, humuro

Abonebla kontraŭ 22 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj
Proveksamplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, pk 67, Ruslando

ANONCU EN LA ELDONAĴOJ DE UEA KAJ TEJO!

(Prezoj en EUR)	1/1p.	1/2p.	1/4p.	1/8p.	1/16p.
Esperanto	1000	550	300	165	90
Kontakto	350	190	100	55	30
Jarlibro*	380	200	110	—	—
Pasporta Servo*	250	130	65	35	—
Dua Bulteno* kaj					
Kongresa Libro*	225	125	70	—	—

Por Esperanto-organizaĵoj 50%-a rabato.

Makleraĵo de 30% al varbinto de ne-movada anonco.

Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble.

*LIMDATOJ:

Jarlibro: 2000 01 31; Pasporta Servo: 1999 12 15;
Dua Bulteno: 1999 11 30; Kongresa Libro: 2000 03 31.

ANONCETOJ:

En Esperanto: por ĉiu vorto unu internacia respond-
kupono (=0,73 EUR).


En Kontakto: por tri vortoj unu internacia respond-
kupono.

En la Jarlibro: por ĉiu komencita linio unu dekono
de la MA-kotizo de la koncerna lando (oni ĉiam
fakturas minimume du liniojn).

En eldonaĵoj de UEA kaj TEJO via anonco atingos
la plej vastan publikon!

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

*Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj
organizaĵoj utilas nur por simbolaj
politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de
plurlingva demokratio efektive diskri-
minacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj
en la solvado de mondaj problemoj?
Kion eblas lerni el la spertoj pri Espe-
ranto? Ĉiu kontribuado en la originala
lingvo (angla, franca aŭ Esperanto),
kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla
teksto de la pionira raporto "Espe-
ranto kaj la lingva demando ĉe Ligo de
Nacioj" de NITOBE Inazō estas unuafoje
publikigita ĉi-libre.*



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE
LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpozio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne
Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: €10,20.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

VORTARO DE HEJMA ESPERANTO

HEJMA VORTARO.


Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto.

Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1999. 63p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Prezo: € 7,50.

Parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme, ofte ne trovas en ordinaraĵ vortaroj nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago.

HEJMA VORTARO helpas al ili. Ĝi proponas Esperantajn nomojn por diversaj ĉiutagaj aferoj.

La Esperantaj kapvortoj estas rekoneblaj per difino, kiun sekvas traduko en 13 lingvoj: angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda. La materialon kolektis la anoj de la komputil-reta diskutejo DENASK-L kaj Rondo Familia.



SANO EL SOCIA VIDPUNKTO




KULTURO KAJ SANO. Referaĵo por la Monda Jardeko de Kultura Evoluo. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. Rotterdam: UEA, 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. Prezo: € 5,40.

Kiel diversaj kulturoj komprenas sanon kaj malsanon? Kio kaŭzis famajn amasmalsanojn kiel malario, variolo, sifiliso kaj aids, kaj kiajn sekvojn ili havis? Kiel rolas narkotaĵoj en la socio kaj ĉu popolaj kuracmetodoj plu valoras? Jen temoj el la tria libro de la Unesko-serio de UEA.

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA 1999. 71p. ISBN 92 9017 062 X. 21cm. Prezo: € 7,10.

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-komunumo? Kiel lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Kontribuaĵoj de H. Tonkin, W. Bormann, Yamasaki S., A. Wandel, R. Corsetti kaj D. Blanke.



KAJ PLIE...

ZAMENHOF, HODIAŬ. A. Chiti-Batelli. Propono aktualigi la lingvan homaranismon de Zamenhof. 20p. 21cm. Prezo: € 2,15.

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO 1999. Red. M. Lipari. Plena prelegaro de IKU en la Berlina UK. 81p. 30cm. Prezo: € 7,80.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>